

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)


**Zaleski-
Zamenhof:
Brazilanoj
estas seriozaj**



**Kongresa
komuniko 3**



**Gbeglo:
Afriko strebas
al mem-subteno**



Piron: Jardekon poste

Vi trovos

81 **Malferme**

Maratoni de kvazaŭo al realo

Stefan MacGill

82 **SURVOJE AL LA ARTO FELIĈI**

Intervjuo de
Hokan Lundberg
kun Claude Piron



ARKIVO DE UEA

*“La lingvo estas sufiĉe forta
por rezisti la maniojn
de kelkaj aŭtoroj.”*

84 **Ameriko**

Zaleski-Zamenhof profunde plonĝis en Brazilon

Laŭ raporto de José Carlos Dorini Ramos



86 Kongresa komunikado 3

87 Reagoj

88 **Afriko**

Afriko plej bezonas amon...

GBEGLO Koffi

...sed ankaŭ monon

Hans Bakker

89 Navige tra TTT-paĝoj

90 Esperanto en radio



91 **Radio**

Pola Radio: Novaj homoj, novaj temoj

92 Recenzoj

Anna Löwenstein pri
Marta

Bård Hekland pri
Legendoj pri SEJM kaj
Ne nur legendoj, ne nur pri SEJM

Valentin Melnikov pri
Amerika skizlibro kaj Vagabonde

Seán Ó Riain pri
Proverbaro – nia komuna heredaĵo

95 Laste aperis

Kaj plue...

96 Fake - Foliume - Influe

98 Loke Oficiala Informilo

99 Persone

100 Forpasoj

La kovrilo: Claude Piron
(F. Veuthey)

Dekstre: Olivarboj en
Andaluzio (Hispana
Ministerio pri Turismo)

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establa kiel organo
de UEA en 1908 de Hector Hodler
(1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.
Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.
Redaktofino: la 10-a de ĉiu monato.
Legata en 115 landoj.
Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande (NLG 68,32;
USD 34; DEM 59; JPY 3900 ktp); informi
ĉu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la Centra
Oficejo. Unuopa ekzemplero kostas
€ 3,00.

Anonctarifo (eŭroj): 1 p. 1000, 1/2 p.
550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera
kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja
ripeto 20%.
Banko: Bank MeesPierson, Postbus
749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro
25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-
konto: 37 89 64 (Den Haag).
Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.
Telefona: +31-10-436-1044.
Telefaksa: +31-10-436-1751.
Retpoŝto: uea@inter.nl.net.
TTT: <http://www.uea.org>
Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.
Direktoro de la Centra Oficejo:
Pasquale Zapelli.



MARATONI DE KVAZAŬO AL REALO

Se vi iam staris je startolinio de maratona kur-konkurso pensante pri la fora fino, tiam vi povas imagi kiom timiga distanco gapas inter la rubrikaj *Strategio* kaj *Financo* (punktoj 2 kaj 19 resp.) en la tagorda skemo uzata en estrarkunsidoj de UEA. Iom perverse... sed samtempe rivele.

Se vi prenas la Strategian Planon kaj reklamilojn de UEA unumane kaj ĝiajn spezokontojn en la alia, impresas kvazaŭ la du devenas el malsamaj asocioj, por ne diri universoj. La ŝlosilaj celoj de disvastigo (informado, instruado), utiligo (servoj, kontaktoj) kaj edukado al tutmonda konscio komencos preni realan signifon nur kiam projektoj sur tiuj kernaj kampoj ricevos adekvatajn rimedojn.

Bona ekzemplo estas la Kvazaŭa Lernejo Tibor Sekelj, centre de la projekto Interkulturo, komuna al UEA kaj ILEI. Ĉi-rubrike vi jam legis pri ĝi (jun. '99, p. 101). Krome ĝi unuafoje prezentiĝis grand-ekrane al tricento da homoj en la ĵusa inaŭguro de la 4-a Eŭropa Esperanto-Kongreso en Ostendo. La projekto trafis latentan bezonon kaj altiris partoprenemon preter ĉies imagoj kaj eĉ kapabloj. Ĝi allogis pli ol du mil lernantojn en 97 klasoj en 28 landoj ekvilibre dissemiĝantaj tra ĉiuj kontinentoj. Realigante la projekton, ILEI ne havis alian elekton ol lanĉi ĝin per libervolaj fortoj. Rapide tiuj montriĝis nesufiĉaj, ekestis ŝtopiĝoj en la kontaktado kun la

kvardeko da senretaj klasoj kaj ĉe la enkomputiligado de la sinprezentadoj kaj verkoj de la klasanoj. La sola vojo sukcesigi la tuton estas transigi parton de tiu laboro al rekompencata stabeto. Pro tio, ILEI prezentis al la Estraro de UEA konkretan proponon ke la eduka kampo, inkluzive de Interkulturo, havu oficistan/volontulan komponenton apoge al la libervola. Finfine ekkonturiĝas ĝusta sinteno al niaj edukaj investoj. ILEI sortas disponigi la fakajn konojn kaj laborfortojn, dum UEA, kiel reprezentanto de la vasta movado, destinas provizi aŭ peri la bezonatajn rimedojn. Surbaze de tiu nova realismo, la lernejo restos kvazaŭa, sed ĝia enhavo, la projekto kaj ĝia utilo pli kaj pli realos.

Espereble, la nuna debato pri harmoniigo de prioritatoj kun rimedoj pruviĝos ne-efemera. Ni fidu ke nia maratona kuristo ne havos superhoman taskon stafeti inter la punktoj *Financo* kaj *Strategio*. Eĉ se plue tagordaj antipodoj, ili trovu sian konvenan meridianon kie kuntanĝi. Tiel niaj disvastigantoj, subtenate de disvastigistoj, havos ŝancojn liveri kontentigajn rezultojn. Alivorte, kaj ĉi-foje vere perverse:

*Celoj en vicordo
Kun rimedoj en akordo
Estas ĝi la kaz' aŭ
Nur aspektas kvazaŭ... ?*

Stefan MacGill

Survoje al la arto fel

Ne pasas en Esperantujo tago, eble eĉ horo, sen ke iu aĉetus aŭ legus verkon de Claude Piron.¹ Hokan Lundberg retpoŝte intervjuis unu el niaj plej popularaj aŭtoroj por sia "Pironejo"² en Interreto, kaj por nia revuo.

■ Kiam vi komencis verki Esperante?

Mi verkis poemojn kiel adoleskanto. Oni trovas kelkajn el ili en *Malmalice*. Mi ne plu memoras kiam mi gajnis premion en la literatura konkurso de UEA (poezia fako), sed devis esti en la jaroj 50-aj.³ Mi estis ĉirkaŭ 20-jara. Mia unua publikigita romano estas *Ĉu vi kuiras ĉine?* (1976).

■ Kial vi verkas tiel multe Esperante?

Ĉar mi ŝatas verki en tiu lingvo. Mi ŝatas verki ankaŭ en la franca, sed multe malpli, ĉar la franca estas tre rigida lingvo. Formi frazon en Esperanto estas por mi plezuro, ĝuo. Kiam mi komencis, mi ankaŭ celis havigi al la esperantistoj modelojn de tio kion mi rigardas bona stilo Esperanta, ĉar mi rimarkis ke multaj esperantistoj ne konscias pri la multaj malsamaj ebloj esprimi ideon. Ŝajnas al mi ke la esperantistaro multe progresis tiurilate, sed ĉu mi efektive influis aŭ ne, mi ne scias.

■ Kiel vi verkas libron?

La procezo ne estas la sama por ĉiu verko. Plej ofte mi havas skizan ideon pri la tuto antaŭ ol komenci, sed tiu ideo estas ankoraŭ tre malpreciza kaj mankhava. Multo alvenas en mian kapon dum mi verkas. Kelkfoje — tio okazis por *Ili kaptis Elzan!*, kies dua eldono baldaŭ aperos — mi havas la impreson ke iu diktas al mi, ke mi devas nur sekvi, frazon post frazo, kio aperas en mia kapo. Por *Gerda malaperis* gvidis min nur la lingva materialo. Mi

havis liston da vortoj kiujn mi devis iom post iom enkonduki, kaj ripeti sufiĉe, por ke ili senpene fiksiĝu en la menso de la leganto. Same pri gramatiko. Tiuj estis miaj ĉefaj priokupoj. Pri la disvolvo de la rakonto mem, min ofte suprizis la ideoj kiuj aperis en mia menso kaj kiujn mi uzis.

■ Kiom longe daŭras verki libron kiel ekzemple Tien?

Preskaŭ ĉiu libro estis malsama rilate al la verkodaŭro, ĉar mi tre dependis de cirkonstancoj. Ekzemple, *Tien* komence devis esti nur novelo, enmetota en kolekton eldonotan de Internacia E-Muzeo. Mi komencis verki la novelon dum someraj ferioj en Engadino. Sed pluvis ĉiutage. Ne la tutan tempon, feliĉe, sed ĉiutage dum mezume duontago. Ni do, anstataŭ tuttagaj ekskursoj en la montaro, kontentigis per duontagaj. Dum la alia duontago mi verkis. La novelo ampleksiĝis de tago al tago, kaj finfine fariĝis romano, kvankam mallonga. La ĉefa verkado okazis dum tri semajnoj, sed poste mi relegis, aldonis, korektis, poluris, disvolvis dum eble ses monatoj, kiam mi disponis liberan tempon.

■ Kial vi foje uzas la plumnomon Johán Valano?

Komence mi volis ke la e-istoj (ĉefe miaj amikoj kaj konatoj) ne sciu ke verkis mi. Tiel mi povis aŭdi pli sincerajn komentojn pri miaj libroj. Sed fakte ne longe post la apero de *Ĉu vi kuiras ĉine?* Claude Gacond diris ĉe la E-programo de la Svisa Radio ke Valano estas mi. Tre rapide la tuta E-mondo sciis. Por *Tien* mi decidis uzi la pseŭdonomon ĉar mi intencis traduki la romanon francan kaj

Claude Piron

Claude Piron naskiĝis en 1931 en Belgio, sed vivas en Svislando. Post laboro kiel tradukisto-protokolisto ĉe UN kaj ĉe Monda Organizo pri Sano, li nun aktivas kiel psikologo kaj psikoterapiisto. Li multfoje instruis en E-medioj, buŝe kaj skribe, pri psikologiaj kaj lingvaj temoj. Post poeta debuto, li populariĝis kiel romanisto (parte sub la plumnomo Johán Valano), kanzonisto, preleganto kaj, precipe, kiel senlaca pledanto por la konsciigo de lingvaj problemoj, de individuaj ĝis tutmondaj. Li verkis unu el la plej legatataj E-libroj de la lastaj jardekoj, *La bona lingvo* (1989, 1997). En 1993 li gajnis Premion Deguĉi.

Kelkaj verkoj de Claude Piron

Esperanto: Ĉu eŭropa aŭ azia lingvo? 1977.

32p. € 2,15.*


Gerda malaperis! 1983. 48p. 21cm. Lingvo-instrua romaneto. € 4,50.

Lasu min paroli plu! 1984. 127p. Kun tekstoj paralelaj al *Gerda malaperis!* € 10,80.

Vere aŭ fantazie. 1989. 216p. Rakontoj el diversaj partoj de la mondo. € 10,80.

La kisa malsano. 1991. 78p. Facila legaĵo. € 4,20.





proponi ĝin al franca eldonejo. Se la romano estus akceptita por publikigo, estus pli bone se la nomo de la aŭtoro kaj tiu de la tradukisto ne estus la samaj.

■ Pri kiu verko vi estas plej kontenta?

Tre malfacile diri. Mi tre ŝatas *Ili kaptis Elzan!*, kiun mi verkis kun la plej granda plezuro. Sed nun eble mi preferas *Tien*.

■ Ĉu vi planas novan libron?

Mi ne havas planon, kvankam mi de tempo al tempo revas pri libro kies titolo eble estus *La arto feliĉi*. Libro mia pri tiu temo aperis en la franca pasintjare.

■ Ĉu vi estas la verkisto pri kiu vi skribas en la fino de *La bona lingvo*?¹

Tion mi ne povas scii. Aŭtoro neniam povas juĝi sin. Al mi ne gravas. Mi verkas kiel eble plej honeste, bele, sincere, interese, sed mi estas homo, kaj do tre limigita. Mi ne povas scii kiagrade mi atingas la nivelon pri kiu mi aludis en *La bona lingvo*. Tion nur la publiko povas decidi.

■ Kiel vi povas estis tiel certa ke venos tia verkisto kiam vi priskribas en *La bona lingvo*?

Mi ne estas centprocente certa. Tio ŝajnas al mi ege probable, ĉar kiam lingvo vivas tiel vigle kiel la nuna Esperanto, kun diversaj amatoraj verkistoj, la probableco estas granda ke unu el tiuj estos malpli amatora ol la aliaj. Ankaŭ ĉar kiam estas forta espero pri iu varo, iu finfine produktos kaj ofertos tiun varon. Sed eble mi plene eraras.

■ Ĉu vi pensas ke verkistoj kiuj uzas multe da neologismoj, minacas la evoluon de la Lingvo Internacia?

Ne. Estas klare ke la e-ista popolo ne ŝatas neologisman lingvaĵon. La lingvo estas sufiĉe forta por rezisti al la manioj de kelkaj aŭtoroj. Simple mi, persone, trovas ke ju malpli da neologismoj, des pli bona la lingvaĵo. Se vi legos *La ŝtona urbo* de Anna Löwenstein, vi vidos ke Esperanto povas esti tute libera je neologismoj kaj tamen pritrakti profundajn pensojn en tre agrabla lingvaĵo, belsona, belstila. ★

¹ Ekz. nur ĉe la Libroservo de UEA la verkoj de Piron/Valano vendiĝis en 1999 en 385 ekzempleroj, kun *La bona lingvo*, *Tien* kaj *Ĉu li venis trakosme?* ĉekape.

² La origina, pli ampleksa teksto de ĉi tiu intervjuo kaj multo plia rilate al Claude Piron troviĝas ĉe: <http://sites.netscape.net/Pironejo/>.

³ Piron gajnis en la jaroj 1954-56 entute kvar premiojn en la poezia branĉo de Belartaj Konkursoj: pro *Premsonĝo* (2.-3. premio, 1954); *La soldato, kiu marŝas kaj Havena nokto* (3.-4., 1955); kaj *La suferoj de aliaj* (2., 1956).

⁴ "Li verkos librojn, kiuj allogos tre ampleksan parton de la lingvokolektivo... [li] bonege regos la ordinaran lingvon, la 'realan'... Li plene rezignos pri la novformoj, kiuj ne eniris la parolan esperanton, ĉar la beleco de lia stilo baziĝos sur plena ekspluato de la esprimo-ebloj, kies riĉecon konstante rivelas la formoj spontane ŝprucantaj, kiam esperantistoj komunikas inter si."


Esperanto el la vidpunkto de verkisto. 1992. 16p. € 3,30.

Le défi des langues. 1994. 335p. Franclingva. Patologiaj aspektoj de la internacia komunikado. € 27,00.

Psychological reactions to Esperanto. Trad. en la anglan William Auld. 1994. 12p. € 2,15.*

DE JOHÁN VALANO

Malmalice. 1977. 59p. Poemaro. € 6,00.




Ĉu li venis trakosme? 1980. 144p. Romano spiona, murda. € 7,80.*

Ili kaptis Elzan! 1985. 100p. Humura, facila romano. € 9,30.

Ĉu vi kuiras ĉine? 1996 (3-a eld.). 135p. Detektiva romano. € 11,10.

Tien. 1997. 139p. Romano pri malfacile kredebla vojaĝo. € 11,10.

*Triona rabato ekde tri ekz. ĉe UEA.



Zaleski-Zamenhof profunde plongis en Brazilon

Se ankoraŭ mankus konscio pri la movada dimensio de la vigla landego Brazilo, ĵusa vizito de la plej konata esperantista nepo, Louis C. Zaleski-Zamenhof, helpus forigi ajnajn dubojn.

Inĝeniero Louis C. Zaleski-Zamenhof, la nepo de Lazaro Ludoviko Zamenhof, faris eventoriĉan viziton de 8 ĝis 16 aprilo al Brazilo, kie lin gastigis la tri ĉefaj brazilaj urboj, San-Paŭlo, la ekonomia ĉefurbo de la lando; Braziljo, la nacia ĉefurbo; kaj Rio-de-Ĵaneiro, la turisma ĉefurbo, eble la plej konata brazila urbo en eksterlando.

San-Paŭlo: Urbo de ZEO-j

D-ro Zaleski-Zamenhof atendis ĉe la flughaveno Guarulhos 15 esperantistoj, i.a. la prezidanto de Brazila E-Ligo, d-ro Osvaldo Pires de Holanda. Specialan servon donis esperantista oficisto de la flugkompanio VARIG, Julio Calegari. La sekvan matenon karavano de 30 esperantistoj vizitis la buston de d-ro L.L.Zamenhof, ĉe Praça da República, en la urbocentro, kie oni plurfoje fotis; de tie la grupo iris al du diversaj stratoj nomataj "Esperanto". Sekvis solena omaĝo en la kunvenejo de E-Asocio de San-Paŭlo, kun kelkaj paroladoj kaj art-prezentoj.

Braziljo kaj Bona Espero

Denove multaj esperantistoj akceptis flughavene d-ro L.C. Zaleski-Zamenhof en la ĉefurbo Braziljo. Post intervjuo por loka radio, tuj li vojaĝis al la bieno Bona Espero por ripozi, sed ne preterlasis la okazon partopreni ceremonion ĉe la Municipa Leĝdona Ĉambro en Alto Paraíso, kie sidejas Bona Espero. Revene al Braziljo la 13-an de apr., li prelegis al la gelernantoj de unu el la Interlernejoj Centroj de Lingvoj. En ICL-oj ordinare tri lingvoj estas instruataj (la angla, la hispana kaj la franca), tamen de post leĝo de



D-ro Zaleski-Zamenhof intervjuata de Roman Dobrzyński kaj plongonta en la akvofalon de Bona Espero.

deputito Jorge Cauhy (1996) kaj dank' al vigla agado de instruisto Josias Ferreira Barboza kaj de la tiama direktoro de la plej granda ICL, Devanizio Apolinário dos Santos (ambaŭ esperantistoj), ankaŭ E-o rajtas esti — kaj estas — instruata.

La 14-an de aprilo okazis ĉe la Distrikta Leĝdona Ĉambro solena kaj oficiala sesio omaĝe al la esperantistoj, laŭ iniciato de deputito Renato Rainha. Krom Rainha, ĉeestis la solenaĵon i.a. la prezidanto de la sesio, dep. Wilson Ferreira de Lima; la ambasadoro de Pollando, Bogusław Zakrzewski, reprezentantoj de Rotario kaj de Brazila Spiritisma Federacio, kaj d-ro David Bernardes dos Santos, direktoro de la Akademio de la Civila Polico de Braziljo (kie Esperanto estas instruata dank' al d-ro Euripedes Barbosa, eksa ĝenerala direktoro de la Civila Polico). Amaso da esperantistoj spektis la sesion kaj ĝuis brazilajn popolkantojn Esperante prezentatajn de infan-

La "nepo" en Bona Espero

Dum sia vizito en Brazilo, D-ro Luis C. Zaleski-Zamenhof pasigis kelkajn tagojn en Alto Paraíso, en la bieno Bona Espero. La infanoj prezentis por li la teatraĵon *La vendistino de revoj*, liberan adapton de unu el la *Fabeloj de la Verda Pigo* de Louis Beaucaire, pri la naskiĝo de la internacia lingvo Esperanto.

La urbestro de Alto Paraíso kaj la urba konsilantaro akceptis la gaston dum solena sesio. Tie la edzino de la urbestro, kiu lernis



Matenmanĝo en Bona Espero

pasintjare E-on, salutis d-ro Zamenhof en Esperanto.

Akompanis la "Nepon" la televida ĵurnalistoj Roman Dobrzyński, kiu filmis la viziton al la kvin ZEO-j de Alto Paraíso. Dum intervjuo d-ro Zamenhof deklaris ke li ĝojas retrovi en Bona Espero la originan Paradizon, el kiu Adamo kaj Eva estis forpelitaj!

Giuseppe Grattapaglia
Bona Espero



Komplezo de Giuseppe Grattapaglia, aliaj fotoj komplezo de Brazilo E-Ligo

koruso. Estas notinde ke ĉi tia omaĝa sesio okazis jam la trian fojon.

Ambasadoro Zakrzewski kaj lia edzino donis neforgeseblan vesperan akcepton kun tipaj polaj frandaĵoj kaj drinkaĵoj. D-ro Zamenhof prelegis pollingve. Esperantista triopo de tri belaj fratinoj, Eimara, Eida kaj Eidi, rikoltis varmajn aplaŭdojn per siaj magiaj flutoj. Filmisto Roman Dobrzyński, kiu ĉiam kaj ĉie rolis kun sia kamerao, ne malkaptis la okazon peti la triopon ludi muzikpecon de lia samlandano Chopin.

D-ro Zaleski-Zamenhof vizitis ankaŭ la sidejon de Brazilo E-Ligo, kie li forte emociĝis aŭdante muzikan adapton de la poemo *Ho, mia kor'* fare de la brazila muzikbando Merlin.

Rio: Lastaj eventoj

En Rio-de-Janeiro d-ro Zaleski-Zamenhof vizitis i.a. Spiritisman Societon de Evangelizado kaj straton Zamenhof. Li tagmanĝis kun elstaruloj de la loka movado en la hejmo de e-istino Neide Barros, premiita en Belartaj Konkursoj en 1998. Vespere la grava gasto de



Esperanto-omaĝa ceremonio en la Distrikta Leĝdona Ĉambro de Brazilo

la brazila Esperanto-movado forflugis al Parizo, lasante en Brazilo tre bonajn impresojn. Certe en sia valizo li kunportis same bonajn impresojn pri la movado batalanta en Brazilo por fari el la revo de lia avo vivantan kaj grandiozan realaĵon.

Laŭ raporto de José Carlos Dorini Ramos

UK Ĝis la 1-a de majo al la Tel-Aviva
UK (25 jul.-1 aŭg. 2000) aliĝis 1056
personoj el 51 landoj.

D-ro Zaleski-Zamenhof parolas

en la Distrikta Leĝdona Ĉambro de Brazilo

Estimataj Gesinjoroj Deputitoj,

Mi estas fiera kaj kontenta stari ĉi tie fronte al vi. Fiera pro la omaĝo kiun vi dediĉas hodiaŭ al mia honorinda antaŭulo; almenaŭ mia persona merito estas nenia tiurilate. Kontenta, ĉi-foje tre persone, pro la okazo al mi donita viziti vian urbon, siaspece unikan en la mondo, urbon kiu ekde sia projekta fazo, de sia plej frua koncepto, ekscitadis mian inĝenieran imagemon. Krome, Brasília povas esti konsiderata "fratino" de Esperanto; ambaŭ artefaritaj kaj ambaŭ pro tio kritikataj, tamen ambaŭ, spite al ĉiaj kritikantoj, prosperaj laŭ sia natura vojo de la evoluo.

Jam en la 50-aj jaroj de la jarcento nun finiĝanta, kiel juna pola inĝeniero, mi ekdeziris kontribui al la starigado de via urbo. Mia deziro aperis tiam tiel konvinka, ke la brazila ambasado en Varsovio senhezite promesis al mi enir- kaj laborpermeson tie. Nur la elirpermeso mankis... kulpe de la politikaj cirkonstancoj en la tiama Pollando.

Tial nur en la 80-aj jaroj okazis ke mi ekkonis vian landon; tiam kiel franca profesoro kaj sperta inĝeniero, pri konstruaĵoj en maro. Je du okazoj mi venis prelegi ĉe la Federacia Universitato de Rio-de-Janeiro en internaciaj simpozioj dediĉitaj al enmara inĝenierado. Mi tiam prelegis pri la varmomiĝado ene de petrolo stokata en submaraj cisternoj; aliafoje pri la laciĝo de konstruaĵoj el antaŭpremita betono sub maraj kondiĉoj; ambaŭ temoj ekscitaj por mi sed eble iom enuigaj por la aŭskultantoj. Tamen, ili akceptis ĉion bonhumore. Bonhumoro ŝajnas esti trajto de brazilanoj; trajto kiu impresis min ekde miaj unuaj paŝoj ĉi tie: de la plej fruaj horoj matenaj ĝis post noktomezo, ĉiuj renkontitaj, pasantoj sur stratoj, homoj ripozantaj aŭ pene laborantaj, riĉuloj kaj malriĉuloj, ĉiuj montradis vizaĝon ornamitan de bela, bonhumora rideto...

Reveninte hejmen, mi rakontadis ke nenie en la mondo mi observis tiom da bonhumoraj homoj kiom mi renkontis en Brazilo. La ĝenerala reago de miaj konversaciaĵoj estis: certe la brazilanoj estas homoj malseriozaj!

Jen mia respondo al tiaj reagoj, ĉerpita el la deklaro de iu usona filozofo, tre serioza homo, kvankam ĝeneralo: "tago dum kiu vi ne ridis, estas tago forstrekinda de via vivo".

La bonhumoro estas do serioza pruvo de vivosenc-kompreno. Kaj jen alia pruvo de la seriozeco de brazilanoj: multnombraj tie troviĝas esperantistoj!

★




En 1999 224 esperantistoj subtenis la agadon de UEA per aliĝo al

Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA! Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA, inviton al akcepto en UK kaj donaceton kun la Jarlibro, kiu en 1999 estis kolekto de Esperanto-poŝtmarkoj. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.





Petra, Jordanio

85-a Universala Kongreso de Esperanto

Tel-Avivo, 25 julio – 1 aŭgusto 2000

Aliĝoj

Ĝis 1 majo aliĝis 1056 homoj el 51 landoj, plej nombre el Japanio (198), Germanio (114), Francio (78), Israelo (64), Pollando (58), Nederlando (55), Italio (50), Usono (34), Brazilo (32) kaj Ruslando (29).

Kongresa temo

La reĝisoro de kongrestemaj program-

eroj ("Lingvo kaj kulturo de paco") estas Boris Kolker (Usono). Kontribuoj kaj ideoj bonvenas pere de la CO.

Prelegoj

Krom la serio de altnivelaj IKU-lekcioj de Humphrey Tonkin, Amri Wandel, Vilmos Benczik k.a., abundos interesaj prelegoj pri la kongresaj temoj kaj lando.

Honora Komitato

Eniris ĝin i.a. unu el la plej famaj verkistoj de Israelo, Ephraim Kishon, kies *Elektitaj satiroj* aperis en Esperanto.

Afiŝoj kaj glumarkoj

Grandaj koloraj afiŝoj de la UK estas riceveblaj kontraŭ afranko-kostoj. Folio de 15 glumarkoj kostas € 1,35.

Antaŭ- kaj post-kongreso

Multaj interesiĝas pri la oficiala antaŭ-kongreso, pri la postkongreso en Jordanio kaj pri ambaŭ rondvojaĝoj tra Israelo. La antaŭ- kaj post-kongresoj al la Nordo de Israelo eble ne okazos pro malsufiĉaj aliĝoj.

Seminario en Pac-oazo

Al la seminario en la juda-araba vilaĝo Pac-oazo (25 julio) ĝis nun aliĝis ĉ. 80 kongresanoj, kiuj aŭdos spertajn prelegantojn judajn kaj arabajn pri la jud-araba konflikto kaj kunekzisto, kaj konatiĝos kun ties lingvaj kaj kulturaj aspektoj. Ĉiuj povos aktive kundiskuti pri konfliktoj kaj solvo-metodoj.

Eblos kombine plani allogajn ekskursojn al la ĉirkaŭaĵo. Vidu ankaŭ marto, p. 42, kaj <http://nswas.com>.

Infana Kongreseto

Aliĝis 18 infanoj el 8 landoj. Gvidantoj estos Ankica Tiŝlar (organizonto de IIK 2001) kaj Stefan MacGill (konstanta komisiito), helpate de Anna-Maria Pinter kaj tri el la infanoj. La IIK-anoj vizitos la kongresejon dum la Tago de la Lernejo (vendrede, 28 jul.) kadre de tuttaga ekskurso al Tel-Avivo. Petu aliĝilon de la CO aŭ de S. MacGill (Bethlen G. u. 2, HU-2030 Érd; ☎+36/23/364-198; ✉stefan.macgill@galamb.net). Informoj ankaŭ ĉe http://www.geocities.com/amik99_1999/ aŭ tra la UEA-paĝo <http://www.uea.com>.

Mendoj

Ĉar la limdato por loĝ- kaj ekskursmendoj estis la 1-a de majo, la CO akceptas nun mendojn nur escepte. Pluraj hoteloj estas jam plenaj, kaj necesas unue konsultiĝi kun la CO antaŭ ol forsendi la mendilon. Post la fino de majo ne plu eblos akcepti mendojn.

Kotizoj

En eŭroj: individua membro de UEA (IM): 165 [landoj kun tarifo B: 123]; ne-IM 207 [155]; IM junulo/kunulo/handikapulo/komitatano: 82 [62]; samaj kategorioj ĉe ne-IM: 123 [93].

Reagoj



La kontribuoj aperantaj en ĉi tiu rubriko esprimas la opinion de siaj aŭtoroj, kaj la redakcio ne respondecas pri ili.

Regreso? Ne ĉe ni!

Mi ne tute konsentas kun Gbeglo Koffi: “oni povas rimarki ke Esperanto ĝenerale regresas en la riĉmondo”

(jan., p. 3). Temas pri bedaŭrinda, nepravigebla defetisma pensmaniero, kiu nun danĝere atakas eĉ e-istojn en gravaj postenoj de la E-movado.

Almenaŭ en Brazilo mi ne vidas tian malprosperon. Kiam antaŭ eble 36 jaroj mi partoprenis mian unuan brazilan E-kongreson en Fortaleza, urbo de unu el la proksimaj UK-oj, tiam neniu kongresano, inkluzive gvidantojn, flue parolis la lingvon. Nun ĉi tie estas multegaj bonegaj parolantoj de E-o. Krome kreskas la nombro de brazilaj municipoj kiuj faras leĝon por enkonduki la instruadon de Esperanto en siaj unuagradaj lernejoj.

Ni ne devas perdi la kuraĝon pro la nuna financa krizo — simila al epidemio, ĝi ne estas eterna. Ni do

malavare monhelpu la E-organizaĵojn ĉie en la mondo, kaj tiuj ĉi inteligente kaj respondece elspezu la monon.

Vivaldo Marcelino Da Silva · Brazilo

Partio sub verda flago?

Vi anoncis fondiĝon de “Esperanto-partio” en Britio (nov. '99, p. 201).

Laŭ mi, temas pri gravega eraro, i.a. pro du kialoj:

1) Se ekzistus “Esperanto-partio”, ne plu eblus kontakti ali-partianojn por peti simpatiojn kaj subtenon por E-o, ĉar ili tiam estus konkurantoj.

2) Ĉar e-istoj estas nur plenmano, la rezultoj okaze de balotado estus kvante ridindaj kaj donus plian armilon al niaj kontraŭuloj por moki la E-mediojn. Persone mi neniam aliĝos al tia “Esperanto-partio” nek voĉdonos por ĝi!



Estus ege preferinde uzi tiujn monon, energion kaj tempon por objekte informi la politikistojn pri konkretaj aplikadoj de Esperanto.

Germain Pirlot · Belgio

Agadi por demokratia idealo

G. Pirlot (dec. '99, p. 211) reagis pri desuprismo kaj desubisma agado. Multe pripensinte, mi venis al la konkludo ke pledi por plurlingveco en la eŭropaj institucioj kaj pledi por adopto de E-o kiel helplingvo por la civitanoj celas al unu sama idealo: lingva demokratio. Ĉiu nia reprezentanto havas la rajton, eĉ devon, aŭdigi la lingvon de siaj reprezentatoj.

Se la eŭropaj instancoj decidus favori du aŭ tri “grandajn” lingvojn, oni konsilos al la civitano ke li lernu unu aŭ du el ili; la ceteraj velkos kiel nuraj regionaj lingvoj. Nur se ĉiuj lingvoj konservos siajn rajtojn, la lernado de neŭtrala

lingvo kiel Esperanto praviĝos.

Kompreneble, la ĉefa problemo estas atingi instruadon de E-o en ĉiuj lernejoj. Kiun oni konvinku pri tio? Kompreneble, la eŭro-parlamentanojn! Do, mi tute konsentas kun la agado de G. Pirlot.

Hélène Falk · Belgio

Kiu kantis Brecht?

En la artikolo pri la Internacia Vespero de la Berlina UK (nov. '99, p. 194) aperis eraro: Barbara Kellerbauer ja kantis Brecht-kanzonojn, sed en la Nacia Vespero, germane; en la Internacia Vespero du muzik-baladojn de Brecht E-lingve kantis mi, kroata aktorino Vida Jerman.

Estas granda bedaŭro ke en Esperantujo teatrajn kaj aliajn artajn aranĝojn preskaŭ ĉiam recenzas neprofesiuloj.

Mi kiel profesia aktorino, kiu jam 25 jaroj profesie ludas E-lingve, atendas almenaŭ ĝustan informon.

Vida Jerman · Kroatio

El la poŝtkesto

Kreu amikarojn!

Kiel vi verŝajne scias, ekzistas pluraj internaciaj organizaĵoj por amikeco kaj servado: plej grave, Rotary International kun 1 200 000 membroj tra la mondo kaj Lions kun 1 235 000 anoj; krome, Kiwanis (300 000) kaj la virinaj Zonta kaj Soroptimist. Ilia komuna trajto estas ke ĝenerale iliaj membroj praktikas liberalan profesion aŭ agadas kiel superaj kadroj, kaj kunvenas kutime unu fojon semajne;

ke ili celas sindediĉe servi al la ĝenerala bono kaj helpi unuopulojn, komunumojn kaj kolektivojn sur loka, nacia kaj internacia niveloj.

Ĉu vere ne troviĝas e-istoj, krom ĉe Rotario, inter la membroj de tiuj grandaj organizaĵoj? Mi mem estas prezidanto de Rotaria Amikaro de E-istoj (RADE), faka asocio oficiale rekonita de Rotario, kun kvardeko



da membroj en 15 landoj kaj la bulteno *RADE-Informilo*. Mi klopodas informi rotarianojn pri la internacia lingvo kaj la E-movado koresponde, prelege, per artikoloj en naciaj rotariaj revuoj ktp, kaj ni renkontiĝas rando de e-istaj aŭ rotariaj kongresoj.

Se ekzistas E-parolantaj membroj de la organizaĵoj supre menciitaj, precipe de *Lions*, mi konsilas ke ili nepre kreu amikarojn similajn al RADE!

Esfil Svane · Francio

Interkultura helpo

Via revuo multe helpis nin por prepari nin al la ĉefa temo, “Interkulturo en la praktiko”, de nia renkontiĝo “Verdaj amikaj tagoj” (9-11 junio).

S. Veličković, Esperanto-Asocio de Senta · Jugoslavio

Rapide al la celo

Hodiaŭ mi hazarde decidis viziti la TTT-ejon de UEA. Mi gratulegas pro la bonega rezulto! Klara kaj bela ejo, sufiĉe rapida, kaj ene de sekundoj mi trovis mian celon!

Derk Ederveen · Nederlando

Afriko plej bezonas amon...

GBEGLO Koffi

Nia estrarano pri afrika agado diagnozas kvar bazajn problemojn en la verdiganta kontinento, kies E-movado strebas al "mem-subtenado".

naciskalaj Esperanto-asocioj. Ni komencis ankaŭ kampanjon por memsubtenado de niaj landaj movadoj. Kelkloke la afero komencas funkcii, eĉ kun surprizoj, kiel ekz. la decido de esperantistoj en Dem. Resp. Kongo helpi malpli bonstatajn homojn, rifuĝintojn el Angolo (vidu ĉi-sube). Se

La afrika Esperanto-movado estas realaĵo, malgranda sed ekzistanta, kun siaj problemoj specifaj.

Unue, niaj esperantistoj estas grandparte junaj, en landoj kie oni respektas maljunulojn, kaj kie alta aĝo estas valoro en si mem.

Alia problemo estas ke preskaŭ ĉion ekster-afrikan ni trovas bona kaj klopodas imiti; tiel kelkfoje, kiam la ecoj imitataj estas malbonaj, ili malhelpas nian evoluon: ekzemple, la interesantista kverelado. Ankaŭ la bonajn ecojn ni imitas, sed ofte por la imitado necesus iu rimedo kiun ni ne havas; jen alia malhelpilo.

Tria problemo estas la fakto ke oni emas interesiĝi pri Afriko nur okaze de grandaj naturaj aŭ militaj katastrofoj. Tio tamen multe malpli sentblas ĉe e-istoj, kiuj laŭdifine interesiĝas pri fremdaj homoj kaj kulturoj.

Kvara problemo: la manko de monrimedoj sufiĉaj por vivteni la fortigantan Esperanto-movadon en Afriko.

Ĝis nun ni ricevis grandan helpon de multaj esperantistoj tra la mondo kaj de E-organizaĵoj (mi nomas nur UEA, ĉar la kompleta listo estas tro longa). Al tiuj ĉi ni adresas niajn sincerajn dankojn. (Kaj ni pardon-



"Ĉiam kadre de Kampanjo 2000", 17 anoj el la E-Klubo Mag. Helga Zamenhof-festis kun gastoj decembre en la tanzania rifuĝejo Lugufu — skribas Muhasa Mutetulwa wa Mahungu (c/o William Sampewi, BP 34, Uvinza, Kigoma, Tanzanio), kursgvidanto. Funkcianta jam pli ol du jarojn, la klubo "produktis" tiajn e-istojn kiel Lwitela M. Guerchoom, kies artikolo ĵus aperis en *Kontakto*.

petas al tiuj kiuj renkontis misuzon de Esperanto fare de afrikanoj; profitemuloj troviĝas ĉie.)

Nun ni komencis sisteme batali kontraŭ enlanda kverelemono, por unuigitaj

oni komparas la sintenon de tiuj, eŭfemisme, malriĉaj konganoj kun la sinteno de pluraj homoj en pli riĉaj socioj, oni povas veni al interesaj konkludoj.

Sed la vojo estas longa — ankoraŭ

Lernejo en Benino

Nova E-centro en Cotonou (Benino) ankaŭ varbas subtenon por sociaj projektoj. Ĝi jam konstruigis unuklasan lernejon en la vilaĝo Codji, kie de oktobro 1999 pli ol 150 infanoj lernas skribi kaj samtempe kutimiĝas al Esperanto, sen devo ĝin lerni. (J. Codjo)

Agado Espero en Afriko

Malgraŭ ĉiuj propraj malfacilaĵoj en Kongo, la E-klubo Stelaro (vicprez. s-ro Kikondola Ngoma Jeremie, Camp CILU II No.71 A, Lukala, Bas-Congo, Dem. Resp. Kongo) decidis helpi rifuĝintojn el Angolo, kiuj vivas en tendaro en la apuda Kilueka. Ĉi tiu Projekto 6 de Agado Espero, "**Kongolandaj e-istoj instruas angolajn rifuĝintojn**", antaŭvidas samtempajn legipovigon kaj E-instruadon al rifuĝintoj. Por tio Stelaro bezonas ĉefe portugallingvajn vortaretojn kaj bazajn lernilojn, kasedojn kaj aliajn E-aĵojn. Gravas ankaŭ letera interesiĝo kaj kuraĝigo — amika kontakto pli ol materia subteno. Se vi volas mone helpi, faru tion pere de Fondaĵo Afriko de UEA, indikante ke vi celas la projekton "Kongolandanoj helpas angolanojn". Pliaj informoj: Hans Bakker (adreso sur p. 89, tuj ĉi-apude) aŭ GBEGLO Koffi (vidu la kolofonon).



Vi estas kore invitataj al la

1-a Nacia Esperanto-kongreso de Malagasa Esperanto-Unuiĝo

de la 18-a ĝis la 20-a de julio 2000 en Antananarivo.

Konstanta kongresa adreso: S-ino Justine Ralalarisoa, Lot. II.C.72-FD Manjakaray, MG-101 Antananarivo, Malagasio

dum longa tempo ni bezonos la helpon de ekster-afrikaj esperantistoj, ekzemple por disvastigi Esperanton en la afrikaj landoj entute sen movado. (Pensu nur ke neniŭ esperantisto ekzistas en landoj kiel Etiopio kaj Somalio.) Ni bezonos vian helpon, karaj ekster-afrikaj esperantistoj, ankaŭ por realigi iom pli ambiciajn projektojn. En Benino ekestis la unua lernejo konstruita de esperantistoj, danke al la solidareco de ĉefe germanaj samideanoj (vidu sube). Similajn projektojn ni intencas realigi ankaŭ en aliaj afrikaj landoj.

Do, la mesaĝo estas klara: ĉiu sumo sendita por Fondaĵo Afriko de UEA estos uzita por progresigi Esperanton en nia kontinento.

Sed ekzistas io kion ni bezonas pli ol monon. Temas pri via amo. Se vi interesiĝos pri ni, se vi aĉetos niajn Esperantaĵojn, se vi korespondos kun niaj kluboj, se vi partoprenos niajn renkontiĝojn, se vi lernos pri niaj lingvoj kaj kulturoj, se vi insiste sekvos la sorton de la projektoj kiujn vi helpas financi, tio estos ankoraŭ pli valora ol la tre valora mono. ★

... sed ankaŭ monon

De post 1980 Esperanto multe disvastiĝis en Afriko. Niaj kolegoj tie multnombros kaj laboras, instalante la movadon en sia kontinento. Subteno per amika korespondado, letera instruado kaj... mono estas la ŝlosilo por sukcesigi ilian mirindan laboron. Per kiaj donacoj ni povus festi la 20-jaran jubileon? Jen mia dezirlisto:

Lernejo en Lomé: 50 mil gld. Tekkomputiloj: po 3500 gld. Abonoj por la revuo *Kontakto*: po 20 gld. jare. (Post jardekoj da donac-abono de ĉ. 200 ekz. jare, nun akre mankas donacoj al Fondaĵo Afriko por kovri la monbezonojn.)

Eble vi ridas pri "Lernejo: 50 mil gld.". Sed en nia prosperega mondo-parto tiaj sumoj jam ne estas fantaziaj. Ni devas plu certigi simpatian kaj subtenadon al niaj afrikaj aktivuloj. Kial ne pere de Fondaĵo Afriko? Informas:

Hans Bakker, Kastelenstraat 231, 1082 EG Amsterdam, Nederlando; ☎/✉+31/20/642-18-53

NAVIGE TRA TTT-PAĜOJ

Jen kelkaj verdaj gutoj el la
inform-oceano de Tut-Tera
Teksaĵo. Sciigu nin pri pluaj
konsultindaj paĝoj Esperantaj!



ESPERANTOLOGIO

"Esperantologio kaj interlingvistiko" (Mark Fettes) prezentas i.a. CED, Esperantic Foundation k.s. instancojn kaj kreejojn: <http://esperantic.org/ced/esplor.htm>
Projektestro Marc van Oostendorp priskribas Projekton NEIGHBOUR (tr. H. Huppertz): <http://www.vanoostendorp.nl/interlinguistiek/neighbour/indekso.htm>

LANDOJ, REGIONOJ

Ĉilia E-Asocio: pretiĝanta, klare strukturita, dulingva: <http://esperanto.cl/index.htm>
E-Asocio de Irlando: <http://homepages.iol.ie/~carsfrn/>
Okcidentslovakia Esperanta Societo, kun prezento de la muzikgrupo Qexteto, bolivia vojaĝrakonto ktp: <http://www.home.sk/www/esperanto/oses.htm>

LITERATURO, TEKSTOJ

Belartaj Konkursoj de UEA, listo de gajnintoj nun ekde la komenco (Sten Johansson): <http://www.angelfire.com/ok/stenjo/belartu.html/>
Johano Paŭlo la 2-a en E-o, kun ligo al la kompleta libro *Esperanto, das neue Latein der Kirche* de U. Matthias: <http://home.t-online.de/home/b.eichkorn/start.htm>
Eldonejo de Christian Bertin (Francio): <http://www.esp.webprovider.com/>

LUDOJ

"La granda Interreta ĉu-ludo pri bestoj kaj plantoj" (Michiel Meeuwissen): <http://www.geocities.com/Athens/Acropolis/4675/cxuludo.html>
SoftMemor elprovas kaj plibonigas sciojn: <http://members.xoom.com/tsalomon/>
Vortaris, E-varianto de la vortludo Textris, ĉe Samir Ribić: <http://come.to/megaribi/>

MUZIKO

Miss Emily Barlaston, kun kamerao en sia dormoĉambro: <http://www.homestead.com/barlaston/indekso.html>
Franca muziko varietea, kanzona: <http://perso.club-internet.fr/jwaterk/esper1.htm>

POLITIKO

La germana Socialdemokratia Partio kaj ties "Virtuala Loka Societo" prezentas sin ankaŭ en Esperanto, zorge de Matthias Peick kaj Tomas Schild: <http://vov.de/>


REVUOJ, BULTENOJ

La Gazeto, kun granda arkivo kaj propra serĉilo: <http://osiek.org/lagazeto/>
Filozofia revuo *Simpozio*: <http://www.cfh.ufsc.br/~simpozio/esperant.html>
Novaĵoj france pri E-o: <http://www.multimania.com/satesperanto/cabouge.html>
Flandra gazetaro, regula elekto (eldono de Flandra Popola Movado, kunlabore kun Flandra E-Ligo): <http://www.vvb.org/fps/es/index.htm>
Skolta monata bulteno *Eurofax* (tr. Guido Ricci): <http://www.scoutnet.org/eurofax/eo/>

SERVOJ, CETERO

Ĉ. 100 virtualaj bildkartoj por diversaj okazoj: <http://esperanto.nu/bildogramo/>
Simila kartejo: <http://www.geocities.com/Athens/Column/6528/htm/kartoj.htm>
Listo de ne-Esperantaj TTT-ejoj uzantaj Esperanton (ĝisdata en decembro 1999): <http://perso.wanadoo.fr/esperanto/ttt-listo.htm>

Esperanto en radio



Internaciaj radioelsendoj en Esperanto (horoj laŭ UTC)

Ĉiutagaj elsendoj

08:30-09:00*	Pola R. Varsovio	Sat (1)	Eŭropo
11:00-11:27	Ĉina R. Int.	7170, 7150	Azio Orienta, Japanio, Koreio
13:00-13:27	Ĉina R. Int.	11650, 15210	Azio Sudorienta
13:30-14:00*	Pola R. Varsovio	7285, 7275	Eŭropo
18:00-18:30*	Pola R. Varsovio	7145	Eŭropo
19:00-19:30*	Pola R. Varsovio	Sat (1)	Eŭropo
20:00-20:27	Ĉina R. Int.	11730, 9965, 11810	Eŭropo
22:30-22:57	Ĉina R. Int.	9860, 11700	Ameriko Latina
24:00/24	Pola R. Varsovio/WRN		TTT (30min.)

Dimanĉaj elsendoj

07:00-07:30	R. Havano Kubo	9820	Azio Pacifika, N. Ameriko
08:05-08:30	R. Aŭstria Int.	6155, 13730, Sat (2, 6)	Eŭropo
08:05-08:30	R. Aŭstria Int.	21650	Azio Orienta
10:05-10:30	R. Aŭstria Int.	6155, 13730, Sat (2, 6)	Eŭropo
10:05-10:30	R. Aŭstria Int.	21650	Azio Orienta
12:05-12:30	R. Aŭstria Int.	6155, 13730, Sat (2, 6)	Eŭropo
15:00-15:30	R. Havano Kubo	11760	Ameriko, Karibio
19:20-19:30*	R. Vatikana	527, 1530, 4005, 5880	Eŭropo
19:20-19:30*	R. Vatikana	Sat (3)	Ameriko
19:20-19:30*	R. Vatikana		TTT
19:30-20:00	R. Havano Kubo	13750, 13715, 13660	Eŭropo, Mediteraneo
20:05-20:30	R. Aŭstria Int.	6155, Sat (2, 6)	Eŭropo, Afriko Okcidenta
21:50-21:59*	R. Vatikana	527, 1530, 4005, 5880	Eŭropo
21:50-21:59*	R. Vatikana		TTT
22:00-22:30	R. Havano Kubo	13750, 13715, 13660	Eŭropo, Mediteraneo
23:30-24:00	R. Havano Kubo	11760, 9505, 6070	Ameriko, Karibio
23:30-23:55	R. Aŭstria Int.	6155, Sat (2, 6)	Eŭropo
24:00/24	R. Aŭstria Int.		TTT (25min.)

La dimanĉa elsendo de R. Vatikana okazas ankaŭ dum kristanaj festotagoj, sambore.

Dum aliaj tagoj

00:04-00:30	R. Aŭstria Int.	Sat (2, 6)	Eŭropo (lunde)
04:05-04:30	R. Aŭstria Int.	6155, 13730, Sat (2, 6)	Eŭropo (lunde)
24:00/24	Estonia R.		TTT (marde, 15min.)
19:20-19:30*	R. Vatikana	1611, 7250, 9645	Eŭropo (merkredo)
19:20-19:30*	R. Vatikana	Sat (4)	Azio, Afriko (merkredo)
19:20-19:30*	R. Vatikana	1611, 7250, 9645	Eŭropo (ĵaŭde)
19:20-19:30*	R. Vatikana	Sat (4)	Azio, Afriko (ĵaŭde)
20:00-20:20	RAI Internacia	11740, 9585, Sat (5)	Eŭropo (sabate)
24:00/24	Västerås Narr.		TTT (regule, 15min.)
24:00/24	Korea E-R. I.		TTT (regule, nereakta)
24:00/24	R. Saluton		TTT (regule, nereakta)

Programo kies horo estas konstanta laŭ MezEŭropa Tempo (do ŝanĝiĝos ekde 2000.10.01). Nuntempe, MET=UTC + 2 h.

Sume, ĉiusemajne ĉirkaŭ 08:24 da originalaj programoj kaj 37:26 da elsendoj.

Vienaj leterlavangoj

La aŭskultantoj de Radio Aŭstria Internacia honoris en 1999 la Esperanto-programon per 10 028 alskriboj; t. e. 111% pli ol en 1998 kaj 28,7% de ĉiuj mesaĝoj venintaj al la tuta Radio Aŭstria Internacia. Malgraŭ ke la elsendo-tempo en Esperanto estas nur sesono de ekz. la angla, franca aŭ hispana, ne malpli ol 60,6% de la retaj mesaĝoj venis al la Esperant-redakcio.

Retadresoj, TTT-paĝoj

Radio Aŭstria: roi.esperanto@orf.at; <http://roi.orf.at/roi/esperanto/welcome.html>

Ĉina Radio: cri@box.cri.com.cn; <http://www.cri.com.cn/>

Estonia Radio: tonu@datanet.ee; <http://er.ee/eng/uudis/>

Havana Radio: kubesp@ip.etecsa.cu; <http://www.radiohc.org/>

Korea Esperanto-Radio Interreta: leono@esperanto-radio.net; <http://esperanto-radio.net/>

Radio Saluton: esperanto@ciudadfutura.com; <http://come.to/e.radio/>

Pola Radio: esperanto.redakcio@radio.com.pl; <http://www.wrn.org/ondemand/poland.html>; <http://www.radio.com.pl/polonia/>

RAI Internacia: silviaradio@rai.it; <http://www.international.rai.it/radio/radio.htm>

Västerås Narr.: <http://www.quicknet.se/home/q-111060/radioe.htm>

Vatikana R.: mc6778@mclink.it; http://www.vatican.va/news_services/radio

Satelitaj indikoj (nomo kaj pozicio de satelito, frekvenco kaj polarizado [+ nomo de la televid-kanalo], frekvenco de la aŭda subportanto)

- (1) Pola R. Varsovio Eutelsat II F6 13 E (Hot Bird), 11.476 GHz Hpol (TVPolonia), 7.38 MHz
- (2) R. Aŭstria Int. Astra 19.2 E, 11.141 GHz Hpol (kanalo 45, Bayern 3), 8.10 MHz, per Astra Diĝita Radio (ADR)
- (3) R. Vatikana Intelsat 603: 34.5 W, 4097.75 MHz LHCP, aŭda kanalo A-1 (Atlantiko, Amerikoj)
- (4) R. Vatikana Intelsat 704: 66 E, 4152.45 MHz RHCP, aŭda kanalo I-1 (Azio, Afriko)
- (5) RAI Internacia Eutelsat IIF6 13E (Hot Bird), 11.446 GHz Vpol (Rai Due), 7.56 MHz
- (6) R. Aŭstria Int. Astra 19.2 E, 12.692 GHz Hpol, en ORF-DVB-Bouquet, SR 22.000, FEC 5/6

Fonto: OSIEK-AERA, Amikaro de E-o en Radio; <http://osiek.org/aera/frekvint.html>

Pola Radio: Novaj homoj, novaj temoj

La komencaj monatoj de la jaro 2000 alportis kelkajn ŝanĝojn en la vivo de la Esperanto-Redakcio de Pola Radio.

Fine de februaro Andrzej Pettyn emeritiĝis — ne rezignante tamen pri kunlaboro —, kaj ekde la 1-a de marto la nova estro de la Redakcio estas Barbara Pietrzak. Samtempe en la Redakcio eklaboris juna, talenta kolego, Remigiusz Grzela. Daŭras kunlaboro kun Ewa Krach, Anna Limont, Milada Szwedko, Wojciech Usakiewicz kaj sporade ankaŭ kun aliaj.

En la nuna elsendoperiodo (ekde la 26-a de marto), la enhavo de la programoj riĉiĝis per sportaj temoj, literaturaĵoj, eroj porinfanaj kaj eroj por komencantoj — ĉio laŭ sugestoj de aŭskultantoj.

En 1999 la E-Redakcio denove okupis la unuan lokon en la tutjara statistiko de alvenintaj leteroj (paperaj kaj retaj): ĝi ricevis preskaŭ duonon de ĉiuj leteroj venantaj al la eksterlanda programo, t.e. 2308 leterojn el 4888, dum la ger-



Arkivo de UEA

La nova gvidantino:
Barbara Pietrzak

Unu el la sen nombraj
intervjuoj faritaj de
Andrzej Pettyn

mana redakcio havis 795, la angla 567, la bjelorusa 396, la rusa 215 ktp. Konsiderinde plinombriĝis lastatempe leteroj kaj raportoj alvenantaj per la reto. La fakto ke ili pli kaj pli venas ankaŭ el ekz. Brazilo kaj Usono indikas ke pli kaj pli oftas la reta aŭskultado de la elsendoj. Pli ofte en 1999 lokaj radioj (ekz. en Tuluzo kaj Melburno) transprenis fragmentojn por utiligo.

Adreso por komputil-posedantoj kun plena alireblo al la reto: <http://www.wrn.org/ondemand/poland.html>.

La TTT-ejo <http://www.radio.com.pl/polonia/> enhavas informojn en Esperanto kaj la pola pri la konstantaj eroj de la semajna kadra programo, kaj ekde la 6-a de marto ĝi afiŝas ankaŭ tekstojn de la informbultenoj — kelkfoje modifitajn kompare kun la aŭdigita versio.

Multaj sonmaterialoj de la E-redakcio de Radio Polonia troviĝas en la sonarkivejo de aŭstra aŭskultanto, Anton Oberndorfer: <http://start.at/retradio/>. Plia sonarkivo troveblas ĉe <http://come.to/e.radio/>.



Novajn fortojn por ILEI

Post la demisio de Atiljo Orellana Rojas kiel sekretario de ILEI, ĝia komitato voĉdonis por nova sekretario: el la 17 validaj voĉoj 13 iris al Mariana Evlogieva (Bulgario). Ŝi superis la kandidatojn Charles Donoghue (Usono) kaj PENG Zhengming (Ĉinio), kiujn la ILEI-estraro invitis fariĝi komisiitoj por fakoj pri kiuj ili kompetentas. Tamen, pro kritiko de la nederlanda sekcio pri la proceduro de la skriba voĉdono, la estraro akceptis ke la nomumo de Evlogieva, nun “aganta sekretario”, estu konfirmita per refoja voĉdono de la ILEI-komitato. Demisiis ankaŭ estrarano Antonio Leoni de León, kaj en la ILEI-konferenco retiriĝos Carla de Lorenzi. Tial la ligo esperas trovi kandidatojn por sia estraro, okupiĝontajn pri instruista trejnado, metodikaj seminarioj kaj universitata agado. La adreso de Mariana Evlogieva: Druŝba-2, PK 18, BG-1582 Sofia, Bulgario; ☎+359/2/243-378; ✉intrpres@usa.net.

Stefan MacGill, vic-prezidanto de ILEI


Tendaraj tagoj



Lernolibro por “Interkulturo” kaj ĉies bezonoj. Tri-kajera serio por 10-ĝis 16-jaraj lernantoj, komplete en Esperanto. Instigaj, variaj kaj paroligaj eroj, kun allogaj ilustraĵoj.



Gvidilo kaj ekstraj ekzercoj en la ILEI-hejmapaĝo: <http://lps.uniroma3.it/ilei>. **Tendaraj tagoj**, kajero 1: € 5,70; kajeroj 2 kaj 3: po € 6,90. Stefan MacGill, ILEI/UEA. Mendu ĉe UEA, triona rabato ekde 3 ekzempleroj.



Recenzoj

Beletra

Ne nur historia specimeno


Marta. Rakonto. Eliza Orzeszko (ps. de Orzeszkowa, 1841-1910). El la pola trad. L. L. Zamenhof. Bielsko-Biała: KLEKS, 1999 (5-a eld). 256p. 20cm. Bind. € 12,00. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Agrable estas konстати ke inter la verkoj kiujn Zamenhof elektis traduki, estis unu kun profunde soci-kritika temo: *Marta*, romano de la pola verkisto Eliza Orzeszko, kiu siaepoke estis unu el la plej popularaj aŭtoroj en Pollando. Ĝiajn romanojn animis la sociaj idealoj de la nesukcesinta kontraŭcara ribelo de 1863.

Marta estis verkita en la dua duono de la 19-a jarcento (la preciza dato ne estas indikita), kaj la Esperanta traduko aperis, kun permeso de la aŭtoro, en 1910. Ĝi temas pri virino de iama nobela fono, kutimiĝinta al bonstata, komforta, kvankam ne luksega vivo. Trafas ŝin neantaŭvidebla tragedio, kiam ŝia juna edzo subite mortas, lasante ŝin sola kun kvarjara filino. Mankas al ŝi iu ajn fonto de enspezo; ŝiaj gepatroj ne plu vivas, kaj la familia bieno perdiĝis pro bankroto.

Marta unue supozas ke ŝi facile trovos laboron, sed ŝi rapide malkovras ke ŝia eduko tute ne preparis ŝin por tia eventualeco. Ŝi ricevis la tipan edukon de junulino de tiu socia klaso en tiu epoko, laŭ kiu ĉiu el la studobjektoj — la franca, muziko, desegnado — estas nur speco de luksa ornamaĵo. Neniun fakon ŝi studis

ĝis tia grado kiu ebligis al ŝi instrui aŭ praktike utiligi ĝin. Aliaj postenoj por



kiuj ŝi proponas sin, estas malfermitaj nur al viroj.

La ĉefa celo de la verkisto estas montri kiel maltaŭga edukado estas donata al tiaj virinoj, kiu tute ne preparas ilin vivteni sin sen la helpo de viro. Krome ŝi vidigas la maljustecon de sistemo kiu rifuzas al virino difinitajn laborojn nur pro ŝia sekso.

gusto. La rakonto progresas rapide, kaj la leganto nepre enplektiĝas en la tragedian rakonton de Marta, dum ŝi senespere serĉadas laboron sed iom post iom fariĝas viktimo de ekspluatado kaj malriĉeco. Iom heligas la melankolian etoson la bonkoreco de la homoj kiujn Marta renkontas. Multaj sincere deziras kaj provas helpi ŝin, sed venkas ilin krom la sociaj konvencioj ankaŭ la suprajeco de la eduko kiun ŝi ricevis.

Apenaŭ necesas paroli pri la kvalito de la traduko, farita de Zamenhof mem. Sufiĉas diri ke dum modernaj verkoj Esperantlingvaj ofte agacas per kapricaj inventaĵoj aŭ per simplaj lingvaj eraroj, ĉi tiun libron oni povas legi kun plezuro, apenaŭ trovante rimarkindaĵojn en la lingvaĵo. Trafas la atenton, tamen, kelkaj apartaĵoj, ekzemple la foja uzo de akuzativo kie ni nun preferus prepozicion: "...virino, kiu eble estas inda pli bonan sorton..." (p. 143); "Mi ankaŭ vin koleros" (t.e. "pro vi"; p. 215). Laŭ la Fundamento, tiu strukturo estas ebla, sed praktike oni ne plu uzas ĝin.

Oni ankaŭ rimarkas foje vortojn kiuj ne plu estas uzataj. Multaj rilatas al objektoj tipaj de la epoko sed ne plu konataj: *kanapo*, *atlaso* (speco de ŝtofo), *kokardo*, *oranĝerio*. Aparte rimarkindas la vorto *akto*, kie nun ni certe uzus *ago*: "akto de amo", "akto de prikalkulo" (p. 10).


Ĉi tiun eldonon enkondukas tre interesa prezento de Marjorie Boulton. Unu kritiko tamen: ŝia artikolo, fakte eltiraĵo el ŝia libro *Zamenhof, aŭtoro de Esperanto*, skizas la plenan intrigon de la romano. Se vi ne volas scii anticipe kiel la rakonto finiĝos, ne legu ĝin poste. Tial la eltiraĵo pli bone estus aperinta kiel postparolo anstataŭ enkonduko. Ŝajne ne venis al la eldonisto la ideo ke ankoraŭ eblas ĝui ĉi tiun verkon simple kiel legindan romanon, ne nur kiel specimemon el la frua historio de Esperanto.

Anna Löwenstein · Italio

KIO ESTU NIA LINGVOPOLITIKO?

POR AKTIVA LINGVOPOLITIKO.
Aktoj de la lingvopolitika
seminario en la 81-a UK de
Esperanto, Prago 1996. Red. D.
Blanke, R. McCoy kaj O. Buller.
Rotterdam: UEA 1999. 71p.
Prezo: € 7,10.

Ĉu ni bezonas lingvopolitikon? Kio estas lingvopolitiko? Ĉu nur UEA devus havi ĝin aŭ la tuta Esperanto-komunumo? Kiel lerni el la spertoj de naciaj lingvoj? Kontribuajoj de H. Tonkin, W. Bormann, Yamasaki S., A. Wandel, R. Corsetti kaj D. Blanke.



Romanoj el la pasinta jarcento estas ofte verkitaj per stilo peza laŭ modernaj normoj. Ĉi tiu tamen estas facile legebla kaj ĝenerale evitas la patosajn devojiĝojn kiuj plaĉis al niaj prageaĵoj sed ne akordiĝas kun la nuna

RET-INFO Retpoŝta Esperanto-novaĵservo
<http://www.esperanto.hu> ret-info@esperanto.org

Duobla spegulo al tempo pasinta

Legendoj pri SEJM. Mikaelo Bronŝtejn (1949). Moskvo: Impeto, 1998 (2-a eld). 111p. 20cm. Ilus. € 5,40. **Ne nur legendoj, ne nur pri SEJM. Homoj kaj epizodoj.** Vladimir Samodaj (1935). Moskvo: Impeto, 1999. 175p. 22cm. € 12,00.

En 1992, jaron post la malfondiĝo de Sovetunio, eldoniĝis eta kajero titolita *Legendoj pri SEJM*. La verkinto estis Mikaelo Bronŝtejn, konata rusia bardo kaj multjara aktivulo. Kaj SEJM — tio estas Sovetia Esperantista Junulara Movado, neoficiala organigita funkcia ekde la fondiĝo en apud-Moskva arbaro (1966) ĝis la pli-malpli "memvola" likvidiĝo 13 jarojn poste, je la fondiĝo de oficiala Asocio de Sovetiaj E-istoj (ASE). Kelkajn jarojn poste estis forvenditaj ĉiuj *Legendoj*, do la aŭtoro pretigis novan eldonon, aldonante "postlegendojn". Samĝenre, eĉ okaze de la 50-jariĝo de Bronŝtejn, Vladimir Samodaj publikigis siajn movadajn memorojn.

Iom malsame la du aŭtoroj alfrontis sian "memorulan" rolon. Bronŝtejn rakontas, babilas ĉefajre, prezentas koheran aron da historioj, kiuj kune bildigas tempon pasintan, gajan sed absolute ne senprobleman. Preskaŭ ĉio rilatas rekte al SEJM kaj junulara agado. Samodaj en sia libro-repliko pritraktas gamon tempe kaj teme pli vastan. La rezulto estas libro multifaceta, foje impresanta kiel pli kompilita ol verkita de la aŭtoro. Aldone al propraj spertoj de 40-jara E-agado, li ankaŭ prezentas biografiojn de kvar aŭ kvin aktivuloj, rakontas pri sia infanaĝo kaj travivaĝoj dum eksterlandaj laborvojaĝoj.

La libroj ekskursigas nin en ne tro foran sovetian pasintecon. Post la likvidiĝo de la sovetia E-movado dum la Stalina teroro en 1937-38 (lasta vivsigno konata al mi estas korespondpeto en *Verdaj Voĉoj* de Ĉinio el '39), kiam estis mortigitaj la gvidantoj kaj multaj aktivuloj, daŭris preskaŭ 20 jarojn ĝis reorganiziĝis la movado. Iniciatis tion veteranoj kiel Bokarev, Podkaminer kaj Armand, ne pereintaj dum la granda purigo. Baldaŭ aliĝis nova generacio. Inter ili estis Vladimir Samodaj, kiu, translokiĝinta el Odeso al Moskvo, ekaktivis en la tiea klubo. Multajn el la postaj eventoj niaj du aŭtoroj nuance malsame prezentas. Tion supozeble klarigas la aĝodiferenco, 14 jaroj, el kiu sekvis malsamaj agadkampoj. Samodaj en 1970 iĝis vicprezidanto de Esperanto-komisiono ĉe SSOD (Unuiĝo de Sovetiaj Societoj de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksterlando), poste vicprezidanto en ASE dum ties tuta ekzisto. Bronŝtejn aktivis en la

junulara movado, preskaŭ seninterrompe kiel komitatano aŭ fakestro de SEJM dum ĝia 13-jara ekzisto. Kiel kutime, la juna pli kritikemas. Bronŝtejn nur amarajn vortojn havas por la Esperanto-komisiono (p. 31); por li ĝi estis desupra kontraŭrimedo por kontroli



la e-istojn. De sia interna lokiĝo, Samodaj priskribas la agadon de la komisiono alie, kiel senĉesan batalon por oficialigo, eldonrajto, por ia helpado de la klubo vivo.

Sub tiaj kondiĉoj, en lando kun malpermeso al ĉia necenzurita eldonado kaj memstaraj organizoj, ne devus eblu fondi SEJM. Tamen, ĝi ekzistis, eĉ provis konvinki la superajn instancojn pri la socia utilo de sia laboro, eldonis informilojn, organizis sukcesajn tutlandajn tendarojn kaj iĝis por generacio de e-istoj somera hejmo, la sopirata E-ujo. Ni forgesu politikon por momento kaj vidu tiun belan, junularan umadon: jen turistaj grupoj pretaj por tendaro, nokta kantado (en dozoj frenezigaj por okcidentano), amikeco, certe eĉ am(oro).

Por nuntempa leganto multo strangan. Kiel povis tiom gravi ĉu Lenin diris tion aŭ tion pri nia lingvo, ĉu Tolstoj aŭ Gorkij ĝin subtenis? Sed en socio kie opinio de aŭtoritato povus signifi permeson aŭ malpermeson de agado, kie la tuta socia scienco devis sekvi ideologiajn principojn, tio ja kompreneblas. Efektive, ĉu tiom malsimilaj estas ni hodiaŭ, aŭvide esperantaj ke iu famulo diru ion pri Esperanto por altiri atenton de la amasoj?

Dum la legado, ĉiam al mi revenadas la demando: Ĉu oni vere kredis je la ideologiaj sloganoj? Ĉu nur taktikaĵoj, ĉu oni subtenis, kontraŭis, indiferentis? Samodaj konfesas (p. 126) ke li kredis: "Mi ne volas kaŝi: mi ĉiam estis troa idealisto kaj profunde kredis, ke nia soveta lando estas la plej justa en la mondo kaj ĉiuj mankoj, okazantaj en nia vivo, dependas nur de apartaj homoj, sed ne pro la reganta reĝimo". Pri tiu sinteno multaj al mi rakontis. Sed certe estis ankaŭ esperantistoj pli kritikemaj. Kion ili nun pensas?

Libroj kiel tiu ĉi ankaŭ estu defio al UEA. Kiel oni rilatis al esperantistoj en Orienta Eŭropo? Ĉu ĉiam la ĝustan strategion oni sekvis, la ĝustajn homojn subtenis? Tia diskuto povas esti fruktodona por difini estontajn rilatojn kun esperantistoj en ŝtatoj kiuj ne sekvas la bazajn principojn de demokratio.

Okazaĵojn malsamaj homoj malsame spertas. Ne ekzistas unusola vero, unu Historio. Tial tiuj kiuj ne konsentas kun la verkintoj, verku siajn versiojn, siajn etajn historiojn, kiuj kune donu al ni imagon pri la pasinta tempo.

Bård Hekland · Norvegio/Rusio

LA PLEJ KONATA LIBRO
PRI EFIKA TEMPOUZO,
NUN EN ESPERANTO!

Lothar J. Seiwert:

**La aboco de
tempoplanado**

Rotterdamo: UEA, 1995. Serio *Konsilaroj por Aktivuloj*
n-ro 2. 53 p. Prezo: € 3,40. Triona rabato ekde 3 ekz.



Skizlibroj de vagabondo

Amerika skizlibro. *Eroj el poeta vivresumo.* 1996. 59p. € 5,85.

Vagabonde. 1998. 64p. € 6,00.
Ambaŭ: Petro Braŭn. Edinburg
(Usono): la aŭtoro. 21cm.

Du libretoj de Petro Braŭn aperis, kiel tekstas la kovrilpaĝoj, en “memeldono” (rekta traduko de la mondkonata rusa vorto *samizdat*). Vere nekutima afero por nuntempa homo el industria civilizo, des pli por usonano.

La aŭtoro laŭnature estas soleca vagabondo. Laŭ principo el la antikva Oriento, li “kion vidas – pri tio kantas”. Montoj, arbaro, bestoj... Vivo kvieti kaj malrapida. Forestas suĝeto* kaj ligoj inter apartaj noveloj, realo miksiĝas kun rememoroj kaj imagoj. Jes, li vere amas la naturon kiu lin ĉirkaŭas kaj kies ekziston liaj apuduloj eĉ ne rimarkas.

En *Amerika Skizlibro* Braŭn priskribas ĉion en kurtaj prozaj fragmentoj; en *Vagabonde* tute samstilaj tekstopoejoj estas tranĉitaj je kurtaj linioj kaj tial pretendas nomiĝi poemaro – miaopinie senbaze.

Eble manko de ritmo kaj rimoj estas arta metodo, sed la aŭtoro povus tamen foje montri siajn kapablojn de vers-arango, por ke oni ne plej nature konkludu: li, simple, ne scipovas... Certe, ekzistas ŝatantoj ankaŭ de tiaspeca arto, tamen primitiveco kaj naivo pli konvenas al infanoj. Kaj la


Freŝa kaj libera lingvouzo impresas per pluraj nekutimaj – sed fundamentaj – vortkunmetoj. *Elde, egejo, spiroekmanke, aĝ-dikega* (arbo), (nun Jugoslavio) *ekeksas* – hontu, neologismo! Foje por kompreno necesas cerbumado – ekz. ke *pravoĉaro* estas *pra-voĉ-aro* kaj ne io alia. Eble iom

strangas la sistema uzo de *eg-* kaj *et-* prefikse (kvankam jam antaŭ 20 jaroj tio troveblis en *La Kancerkliniko*). Agacas la okulojn manko de apostrofo eĉ substantivaj elizioj – kvankam apostrofitaĵoj radikoj ofte estas uzataj prepozicie. Ĉeestas kelkaj eraroj pri transitiveco kaj akuzativo.

Malgraŭ tio indas aplaŭdi la aŭtoron, kiu libere uzas E-on kaj, laŭ kelkaj frazoj, tre bone orientiĝas en la E-literaturo – en lando kie plejmulto konas neniun lingvon krom la “internacia” fuŝangla. Petro Braŭn havas rekoneblan stilon, liaj verkoj “siapropre odoras” (jen ankoraŭ unu lia brila esprimo!). Do, li meritas ke leganto mem formu opinion.

Valentin Melnikov • Rusio

sufeto = temo de beletra verko (*Neologisma glosaro*)



aŭtoro/protagonisto konstante rememoras sian infanaĝon kaj ankaŭ nun ofte kondukas kiel infano – sen grandaj zorgoj, sen “ankroĵoj” en la vivo. Ĉiu mem decidu ĉu aprobi tian vivmanieron aŭ ne.

Saĝo homare komuna

Proverbaro – nia komuna


heredaĵo. Redaktis kaj tradukis Erkki Röntynen. Oulu: la kompilinto, 1999. 203p. 25cm. Ilus. € 15,00.

Unu el la plej gravaj servoj de Zamenhof al la siatempe nova lingvo Esperanto estis lia *Proverbaro*, aperinta en 1910. Pere de ĝi li donis radikojn al la lingvo, beligis ĝin, kaj kvazaŭ kreis tradicion.

Proverbaro – nia komuna heredaĵo estas pli ampleksa libro. La aŭtoro citas Warinĝien pri la Zamenhofa verko: “oni volonte vidus migri tra ĝiaj linioj, krom niaj tradiciaj bovoj, hundoj aŭ musoj, ankaŭ la simpatian hienon aŭ la teruran tigron de la hindaj proverboj” (p. 4). Kaj Röntynen certe donas tion: ĉi tiu kolekto enhavas proverbojn el la tuta terglobo; multajn el Afriko, Hindio, Japanio, Ĉinio, Brazilo, eĉ Taĝikio. En tiu senco ĝi multe pli internacias ol la Zamenhofa kolekto.

En 10-paĝa enkonduko la aŭtoro klarigas siajn konceptojn pri proverboj, precipe kial

ili allogas, de la praheredaĵo ĝis la sprita ludo. Li skribas (p. 5) ke “proverbo estas lakona ĉiutaga esprimo, kiu trafas akre kaj profunde pro tio, ke ĝi peras gravan sperton aŭ observon kaj ĝi enhavas kontraŭecon,



kiu ebligas simplan kaj akran – aŭ humuran – mallongan frazon.” En la irlanda lingvo *proverbo* tradukiĝas per *seanfhocal*, t.e.

“malnova vorto”, sed la irlanda tradicio plivalorigas la mallongan, sencoplenan proverbon, ekz. *trí ghluín ó rí go rámhainn* (“tri generacioj de reĝo ĝis ŝpato”).

Ĉu mi vidas mankojn en la verko? Ne multe. Mi menciu nur unu: kompare kun la Zamenhofa kolekto, malplias rimajoj. Persone mi preferas “Matena horo estas plena de oro” al “Frua matenmango egalas al oro” (p. 101, Maroko). Sed, kompreneble, Röntynen pli fidele sekvas la originalajn proverbojn, kaj Zamenhof havis alian celon: krei tradicion.

Mi forte rekomendas ĉi tiun plezurigan kaj pensigan, ege valoran verkon, kiu, antaŭ ĉio, substrekas nian komunan homecon.

Fine, kelkaj proverboj: *Linko aspektas bunta, homa bunteco estas ene* (p. 17, Armenio); *Lango ne havas ostojn, sed ĝi rompas multajn dorsojn* (p. 102, Italio); *Studu historion, vi scias [scios] estonton* (p. 95, Ĉinio); *Grandegaj estas la kornoj de la transmaraj bovoj* (p. 5, Tahitio). Por ĉi lasta proverbo ni havas laŭvortan ekvivalenton en la irlanda lingvo, kaj ni tute ne najbaras Tahitio! Kiu influis kiun? Aŭ ĉu plia ekzemplo de pensmaniero homare komuna?

Seán Ó Ríain • Irlando

Laste aperis



LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 2,25 eŭroj. Antaŭdankon pro via mendo!

Ĉefaj principoj de fremdlingvo-instruado, La. *Praktikaj konsiloj por Esperanto-kursgvidantoj.* Aleksandro S. Melnikov (1951). Rostov-na-Donu: Rostova Ŝtata Pedagogia Universitato — ILEI, 1999. 96p. ISBN 5 8480 0212 6. 20cm. Kun abunda distra materialo, cele al malTEDIGO de la lecionoj. € 9,00.

Ĉu ni vere helpas la trian mondon? Glyn Roberts. Trad. Gaĭta Robert. Laroque Timbaut: Cercle espérantiste agenais, 1984. 59p. 21cm. € 2,40.

Dictionnaire pratique français-espéranto, espéranto-français. Red. André Andrieu (1932). Paris: SAT-Amikaro, 2000. 519p. ISBN 2 9508809 3 2. 20cm. Bind. Aktualigo de la eldono de 1959. Kun 20 000 francaj kapvortoj, kaj ekvivalentoj por ĉiu Esperanta vorto uzata en la unua parto. € 27,00.

Domo de Maria helpantino, La (1904). Ivan Cankar (1876-1918). El la slovena trad. Vinko Oŝlak. Krakovo: Jadwiga, 1999. 116p. 21cm. Sociale inspirita romano el la proleta Vieno de la jaro 1905. € 12,00.

Drakula. [on] Sârbru (1914). Braŝov: La aŭtoro, 1998. 99p. 21cm. Biografio de la historie aŭtenta Drakula (9 p.), plus 11 noveloj kaj miniaturoj tradukitaj el la rumana literaturo. € 9,00.

Esperanto als Ratespaß. Ulrich Matthias (1966). Heidelberg: Deutsche Esp.-Jugend, 2000 (5-a eld.). 45p. 21cm. Germanlingva. Prezento de Esperanto per divenludoj pri sufiksoj kaj kunmetoj. € 1,80.

Estonoj tra tempoj II. Valev Kruusalu. Tallinn: E-Asocio de Estonio, 1998. 73p. ISBN 9985 9130 3 5. 21cm. Epizodoj el la estona historio, kun apendicaj pensoj pri la nuntempo. € 6,00.

Fronte al la vivo / Eduko kaj vivsignifo. Jiddu Krishnamurti (1895-1986). El la angla trad. Rubén Feldman González, Kribo. Beauville: 1998. 62+39p. 21cm. Spiritaj instruoj. Kompilo el pluraj verkoj. € 3,60.

Legendo pri la bela Pekopeno kaj la bela Boldura (1842). El "Le Rhin" (Rejno). Viktoro Hugo (1802-85). El la franca trad. Valo. [Laroque:] SAT-Broŝurservo, 1988. 70p. 21cm. Fantasta fabelo inspirita de germanaj legendoj. € 2,70.

Malbabela jaro, La. (El la taglibro por la jaro 1987). Vinko Oŝlak (1947). Krakovo:

Nia individuismo. Ĝiaj depostuloj kaj tezoj per demandoj kaj respondoj. E. Armand. El la franca trad. D. C. Laroque Timbaut: Broŝurservo de SAT, 1981. 28p. 21cm. € 0,90.

Poemoj de Omar Kajam. El la persa trad. G. Waringhien. Beauville: SAT-Broŝurservo/Laŭtel, 1994. 60p. 21cm. 150 robaiĵoj. € 2,40.


Rajto de pigro, La (1880). Paŭlo Lafargue (1842-1911). El la franca trad. Kribo. Beauville: Broŝurservo de SAT, 1994. 33p. 21cm. Pamfleto verve verkita de la bofilo de Karlo Markso. € 1,80.

Ŝtona gasto, La. *Miniatura tragedio en 4 scenoj laŭ Puŝkin.* Michel Duc Goninaz (1933). Laroque Timbaut: Cercle espérantiste agenais, 1989 (2-a eld.). 24p. 21cm. Por kvar roluloj; laŭ la mito de Donjuano. € 1,20.

Tielu cihui. *Fervoja terminaro en ĉina, Esperanta, angla lingvo.* Red. Li Sen (1923).

Beijing: Ĉina Fervojistaro E-Asocio, 1999. 610p. 26cm. Bind. Kromkovrilo. Ĉ. 14 mil terminoj, kun Esperanta kaj angla indeksoj. € 24,00.

Unueco super prokreda dividiĝo (1931). Leo Polak (1880-1941). El la nederlanda trad. Feiko Munniksma. Laroque Timbaut: Cercle espérantiste agenais, 1983. 12p. 21cm. Radio-parolado. € 0,60.




Du libroj kiujn oni emas finlegi senpaŭze, kaj unu kiun ĉiu fervojemulo daŭre konsultos fruktodone.

Jadwiga, 1999. 153p. 21cm. Pensoj kaj spertoj de slovena katolika intelektulo esperantista, daŭrigo al *Jen la sablo el mia klepsidro* (1983-86). € 15,00.

Mistero de nia surtera ekzisto, La (1944). E. Archdeacon (1863-1950). El la franca trad. André Caubel. Beauville: SAT-Broŝurservo/Laŭtel, 1993. 28p. 21cm. Origine aperis en "Biblioteko de la Liberpensulo". € 0,90.

Modernaj Robinzonoj. *En la siberia praarbaro* (1923). Teodoro Schwartz (1894-1968). Enkonduko de Humphrey Tonkin. Berkeley: Bero, 1999 (2-a, redaktita eldono). 9+47p. ISBN 1 882251 24 5. 22cm. Kun mapo. Kiel la fondonto de *Literatura Mondo* sukcesis eskapi el rusa militkaptiteco, trabatante al si vojon en danĝerejoj? Suspensoplena rakonto. € 6,00.



Festu Tinĉjon eĉ 71-jaran! *De kiam la detektiveto debutis en 1929, vendiĝis milionoj da Tinĉjo-bildstrioj en pli ol 32 lingvoj. La du Esperantajn titolojn oni jam kredis elĉerpitaj, sed nia Libroservo akiris stokon de La nigra insulo; ĝi estas nun ties ĉefa distribuanto.*

La nigra insulo. Hergé. Trad. Jopetro Danvy. Paris: Esperantix, 1987. 62p. 30cm. € 10,00.

Kaj plue...



KATOLIKOJ: Enketo pri Kristo

Internacia Katolika Unuiĝo E-ista petas respondi, en ne pli ol 10 linioj, al la demando "Kiu estas Jesuo Kristo por mi?". Indiku viajn religion, landon, aĝon, profesion, nomon kaj adreson. Estas atendataj (ĉe A. Gambuti, Via Bellini 24, IT-47039 Savignano sul Rubicone, Italio) respondoj ankaŭ de neesperantistoj, de homoj el ĉiuj religioj kaj de nekredantoj. Traduku kaj disvastigu la enketon ankaŭ naciligve, kaj sendu E-tradukon de la plenigitaj enketiloj al IKUE.

KONKURSOJ: Fotinte, poemu

Post sukceso en 1998, la revuo *La Ondo de Esperanto* kaj Urala E-ista Societo (UES) organizis internacian fotokonkurson ankaŭ en 1999. El 17 aŭtoroj el 11 landoj, kiuj alsendis 43 verkojn, la 1-an

premion (du minimumajn monatsalajrojn ruslandajn kaj abonon al *La Ondo*) gajnis Sandra Burgues Roca (Urugvajo) pro la bildo "Konstruante novan homon". La 2-an premion ricevis Andrea Ottrók (Hungario), la 3-an Harri Melasniemi (Finnlando).

• UES kaj *La Ondo* anoncas ankaŭ beletran konkurson, "Liro-2000", en kvar branĉoj: originalaj prozo (novelo kun ne pli ol 20 mil tajperoj) kaj poezio (sen limigoj); tradukaj prozo (elrusigo de la Ĉeĥov-novelo *Sapogi*) kaj poezio (elrusigo de *Ustal ja ĵiti v rodnom kraju*... de Jesenin). En ĉiu branĉo oni partoprenu per ne pli ol tri verkoj, ne jam publikigitaj aŭ ie premiitaj, en formo nete legebla, sendendaj antaŭ 1 okt. al: RU-620077 Jekaterinburg-77, ab. ja. 67, Ruslando. Subskribu pseŭdonime kaj aldonu slipon kun via identeco. La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn.

LINGVAJ RAJTOJ: Deklaracio


La Universala Deklaracio de Lingvaj Rajtoj, proklamita en Barcelono en 1996 (vidu dec. '98, p. 206) estis tradukita de Perla Martinelli kaj Giorgio Silfer en Esperanto kaj aperos en *Literatura Foiro*.

RADIO: Viena vizito

Dudeko da partoprenantoj — grandparte blinduloj — ĝuis la 8-an de aprilo gvidadon tra televidaj kaj radio-studioj de la Viena ORF, laŭ organizo de Esperanto-Redakcio de Radio Aŭstria Internacia. (J. Toszegi)



Walter Klag fotis ĉi tiun Esperantan markonomon sur Viena liver-aŭto.



MUZIKO: Misio plenumita

Kiam en 1998 estis lanĉita, kadre de Kampanjo 2000, la projekto Kolekto 2000, eĉ la Tuluza (Francio) muzik-eldonisto Vinilkosmo (kies animo estas Floréal Martorell) ne supozis ke la dek-peca kolekto kompletigis jam printempe de la jaro 2000. Dank' al altkvalita kaj serioza laboro de ĉiuj partoprenintaj artistoj kaj al konstanta subteno de FAME-

Fondaĵo, la celo estis frue plenumita. Per la diskoj *Kia viv' kaj Dolcxamar** (vidu apr., p. 75), naŭa kaj deka en la vico, la kolekto estas nun fermita.

Sed per tio ne fermiĝis la projektaro de Vinilkosmo: ĝi ĵus kuneldonis kun la brazila "La Blua Papilio" la bru-muzikan kompildiskojn *Esperanto subgrunde*, kiu estos baldaŭ havebla ĉe la Libroservo de UEA.

La 30-an de aprilo la disko estis lanĉita en Tuluza skvatejo, per koncerto de bandoj kiel "La bestoj", "La drinkomaniuloj", "Violenta Topaloff" kaj aliaj.

* "Dolcxamar" estas skribenda kun ikso; tio laŭ la klavaristo de la grupo, Pieĉjo (Patrik Austin) "aspektas bone kaj moderne, estas interreta afero... pli facile skribebla ol ĉo". (*Esperantolehti*)



ZAMENHOF/ESPERANTO-OBJEKTOJ


En la Zamenhofa tago, memortabulo al Marko Zamenhof (skulptisto Jerzy Grygorczuk) estis inaŭgurita en lia naskiĝ-urbo Tykocin, sur lia iama loĝdomo (nun str. Piłsudskiego 25), en ĉeesto de lia pranepo Louis C. Zaleski-Zamenhof kaj de urbestro Dominik Włoskowski. (R. Boré)



- La nomon Esperantska ("Esperanta") ricevis nova strato en Prostějov (Ĉeĥio) en decembro 1999. (Evento)
- Unuafoje en Kostariko estis inaŭgurita ZEO. Sur la bela mar-mora tabulo (60 X 60 cm) oni legas en Esperanto:

"Carlos Gagini (1865-1925): Eminentata kostarika pioniro kiel filologo kaj kulturisto de lingvo internacia Esperanto. Memorigante la 75-an datrevenon de lia forpaso: la 31-an de marto 2000. Kostarika Esperanto-Asocio."

Gagini estis grava intelektulo, kies nepublikigita manuskripto *Cartilla Esperantista* estis retrovita nur en 1993, de la e-istoj Antonio Leoni de León kaj Shirley Barquero. La tabulon oni fiksas en vestiblo de la Fakto pri Beletro de la Universitato de Kostariko, la 4-an de aprilo 2000. Senvualigis ĝin dekano M. L. Enrique Margery, en la ĉeesto de i.a. Adam Komarowski de la pola ambasado kaj de Atilio Orellana Rojas, reprezentanto de UEA. Gvidis la cermonion Hugo Mora Poltronieri, vicprezidanto de Kostarika E-Asocio.



BARATO: Al 4,23 milionoj

La prezidanto de Federacio E-o de Barato, d-ro Abdul Salam, donis bazajn informojn pri la nuntempaj bezonoj kaj uzo de Esperanto intervjuate de angla-lingva tagjurnalo, *The Times of India* (4,23 milionoj da legantoj), la 14-an de apr. Legebla ĉe <http://www.timesofindia.com/110400/11intw1.htm>. (A. G. Rao)

GERMANIO: Paska donaco

La televido TM3 elsendis en la paska dimanĉo (23 apr.) al tuta Germanio 7-minutan intervjuon kun Fritz Hilbert pri Esperanto,

kun ripeto la postan matenon. Estis montritaj ankaŭ la retadresoj de Bavara E-Ligo kaj Germana E-Asocio; la spektantoj povis krome peti informojn per faksa revoko. (F. Hilbert, Ret-Info)

D. R. KONGO: Ĵurnalisto dubas

La 16-an de apr. Ferdinand Kinani televide informis pri Kultura Arta Festivalo de Esperanto, okazonta en Tuluzo (vidu p. 98). La intervjuanta ĵurnalisto dubis pri lia informo. Konga E-Rondo petas e-istojn sendi konfirmajn retmesaĝojn franclingvajn al Y_Kambala@myplace.com.

USONO: Voĉo Amerika


"Kial Esperanto estas politike neŭtrala kaj facile lernebla?" Jen la temo de tuthora televida babil-programo la 7-an de marto, ĉe la internacia satelita televid-



KELKLINIE

Ĉe Itlis prespretas festlibro por André Albaut. ... *Heroldo de Esperanto* festis 80-jariĝon la 14-an de aprilo. ... Nova revueto, *Ni Sep*, prezentas hindan literaturon.

EVOLUO DE ABONOJ DE JUNA AMIKO 1994-1999



Brazila Amiko?

La abonantaro de la jarkvarona revuo porinfana, *Juna Amiko* (red. Géza Kurucz, Hittel u. 10, HU-6000 Kecskemét, Hungario; kg@esperanto.nu, <http://www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto>), senhalte kreskas en la lastaj 6 jaroj, kaj nun ĝi proksimiĝas al la cifero 2000. Tio pli ol duone dankeblas al tio ke ekde 1997 Brazila Esperanto-Ligo igas sian tutan membraron abonantoj. *Juna Amiko* eniras 82 landojn, kaj en multaj oni ricevas la revuon je aŭ sub la kostoprezo.

reto Voice of America, ankaŭ Interrete alirebla (<http://www.voa.gov/talk/archive>). Jim Lieberman, estrarano de Esperantic

Studies Foundation, ricevis ankaŭ telefonajn demandojn, el Sud-Afriko, Nepalo kaj Brazilo. (*EsperantoUSA*)

BBC: Ne elsendas, sed eldonas Esperanton

Attila Kovács (Hungario) demandis la tutmondan radioservon de la brita BBC ĉu ĝi povus iel enkonduki Esperanton. Laŭ la respondo, "BBC Mond-Servo ne planas ekfunkciigi elsendon en Esperanto en la estonteco", pro buĝetaj limigoj, kaj tial ke la "celaŭskultantaro por iu ajn lingvo konsistas el la homoj vivantaj en la regiono kie la lingvo estas plej vaste parolata, kaj E-o ne plenumas la kriterion de BBC tiusence". (Ret-Info)

BBC WORLD SERVICE

BBC MUNDO

BBC РУССКАЯ СЛУЖБА

BBC بي بي سي أونلاين

- En libro-duopo ligita al radio-serio de BBC, "La vojoj de la angla", 10-linian pozitivan mencion de E-o kaj d-ro Zamenhof akompanas kolora kovril-bildo de la Esperanta *Winnie-la-Pu*. Sur unu el la kunaj kompaktdiskoj, Peter Danning deklamas poemon en E-o. (P. Hewitt)



ANTARKTO: Pacmesaĝo en E-o

Memore al Monda Scienca Pintkunveno okazanta samtempe en tri argentinaj lokoj (Bonaero, Ushuaia, kaj la antarkta bazo Marambio), la 27-an de apr. onien terigis subneĝen mesaĝon por venontaj generacioj. Dank' al rapida organizado de Silvia Rottenberg, prezidanto de Argentina E-Ligo, kaj al ekspresa traduklaboro de Pablo León, eblis last-minute aldoni E-lingvan varianton al la teksto hispana, angla, franca kaj itala. (A. Orellana Rojas)

EBURA BORDO: E-Instituto

En Abiĝano fondiĝis pasintan aŭguston Afrika E-Instituto (02 BP 537 Abidjan 02, Ebura Bordo). Ĝin prezidas Yassi Ambroise.

FINNLANDO: Etskalaj projektoj

Pri translima E-kunlaboro diskutis ĉ. 40 homoj dum la tradiciaj Vintraj Tagoj (Rovaniemi, 18-19 marto). Oni konstatis ke, pro la malmulteco de e-istoj en nordaj Norvegio, Svedio, Finnlando kaj Ruslando (kelkdek), nur et-skalaj projektoj havas sencon: organizi

E-kursojn en nemovadaj aranĝoj, kunrealigi turismajn rondvojaĝojn, E-igi turismajn tekstojn ks.

Jukka Laaksonen, prezidanto de Esperanto-Asocio de Finnlando, prezentis novan planon por informado, kiu allogu gejunulojn (feb., p. 38). Kontraste, Osmo Buller pledis por varbado inter pliaĝuloj, ĉar pensiigas ĉiam pli da edukitaj, agemaj kaj lernemaj homoj. (*La Ondo de Esperanto*)

FRANCIO: KAFE-reklamo

JoMo, Persone, Solo, Ĵomart kaj Nataša, Dolcxamar, Ĵ. Le Puil, J. Fornal, f-ino Barlaston... jen nur kelkaj el tiuj kies arton eblos admiri en Kultura Arta Festivalo Esperanta (KAFe, 5-9 jul., Tuluzo; <http://perso.wanadoo.fr/kultur.art.festival.eo/>). Ridetas du organizantoj: Floréal Martorell (maldekstre) kaj Arno Lagrange.



Iama sinagogo – Nekadaŝnja sinagoga – Hajdani zsinagóga (1873-1957) SENTA

JUGOSLAVIO: Senta stampo

Salute al la 85-a UK en Tel-Avivo, E-Asocio de Senta eldonis du poŝtkartojn kun speciala stampo je 14 apr., la 83-a mort-datreveno de Zamenhof. (S. Veličković)

HISPANIO: Aprobo al Kordobo

La hispana Fondaĵo Esperanto, subvencianta grupojn kaj individuojn E-aktivajn, aljuĝis i.a. 80 mil pesetojn (ĉ. € 480) al asocio de interpretistoj pri surdmutula signolingvo en Kordobo, por ke ĝi organizu E-kurson kaj eldonu broŝuron pri Esperanto, kunlaboro kun la loka E-grupo. Tiu asocio eksciis pri la subvencia eblo el *Perfiles*, revuo de Hispana Organizo de Blinduloj. (*Boletín*)

HUNGARIO: Verda impostero

Hungaraj civitanoj rajtas subvencii neprofitcelajn organizaĵojn per 1% de siaj laŭenspezaj impostoj. Investinte 350 mil forintojn (ĉ. € 1360) en komunan kampanjon, E-Domo de Budapeŝto kaj Hungaria E-Asocio kolektis ĉ. 750 mil forintojn (pli ol € 2900), t. e. nete 400 mil (ĉ. € 1550). Pro siaj malsamaj prioritatoj, la du organizaĵoj ĉi-jare kampanjos aparte. (L. Szilvási)

KROATIO: Prestiĝaj protektoj

La prezidento de Kroatio, Stipe Mesić, akceptis la inviton de UEA fariĝi Alta Protektanto de la 86-a UK (Zagrebo, 2001). La prestiĝon de Esperanto en Kroatio atestas ankaŭ la multnombreco de eminentuloj de la kultura, scienca kaj politika vivo kiuj eniris la Honoran Komitaton de la UK. Multaj el ili ne nur principe simpatias kun la celoj de la UK, sed jam en antaŭaj okazoj konkrete apogis E-iniciatojn aŭ eĉ iam lernis la lingvon. Tiel faris en 16-jara aĝo la ministro pri turismo, Pave Zupan-Rusković, kiu en 1962 partoprenis SAT-kongreson en Vieno kun siaj samklasanoj kaj E-instruisto Dinko Matković. (S. ŝtimec)

MAKEDONIO: Ilia Estonto

La junulara E-societo Estonto (p. f. 197, MK-7500, Prilep) festis sian 5-jariĝon la 26-an de marto per E-ekspozicio fokuse al →

Oficiala informilo

PATRONOJ DE TEJO 2000

Argentino: Rodolfo G. Calógero. Norvegio: Margrete Landmark.

SOCIETO ZAMENHOF 2000

Belgio: Karel Van Steenberghe. Danio: Emil Vaarst. Finnlando: Liisa Bergman. Kanado: Bruce R. Crisp; Stevens T. Norvell Jr. Korea Resp.: LEE Chong-Yeong. Nederlando: M. van Bentum-v. d. Broek. Norvegio: Margrete Landmark. Svedio: Gunnar Olsson. Svislando: David Cohen. Usono: David Wolff.

DONACIOJ 2000 (EUR)

ĝis la 31-a de marto

Fondaĵo Afriko: Nederlando: Fam. ten Hagen

100,00. Svedio: J. Hammarberg 23,48. Usono: W. R. Harmon 100,00. Sumo ĉi-jara 1455,62.

Fondaĵo Ameriko: Brazilo: R. Lemos 40,00; L. F. C. Vencio 57,00. Italio: R. Corsetti 20,00. Usono: K. Freeman 48,89. Sumo ĉi-jara: 726,71.

Fondaĵo Azio: Ĉinio: S. Kuzume 48,83. Japanio: K. Hayasi 19,53; A. Hosida 19,53; H. Hukumoto 97,66; T. Itabasi 19,53; H. Inumaru 19,53; Y. Itou 39,06; K. Kakehi 39,07; S. Kitagawa 19,53; U. Kobayasi 19,53; M. Kubota 19,53; H. Matuda 39,06; Y. Mine 39,06; T. Nisi 97,66; Y. Sasaki 19,53; K. Sasanuma 19,53; S. Sugiyama 19,23; S. Tezuka 19,23; S. Yamamoto 19,23. Sumo ĉi-jara: 3494,94.

Fondaĵo Kanuto: Francio: R. Despujols 45,73; P. Hamon 3,05; C. Haren 48,02; B. Robineau 44,21. Sumo ĉi-jara: 710,31.

Propaganda Konto: Italio: S. G. Delcarmino 5,68. Sumo ĉi-jara: 5,68.

Junulara Fondaĵo: Aŭstralio: J. Jones 12,05. Sumo ĉi-jara: 1536,54.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Germanio: F. J. Braun 20,00. Japanio: E. Isii 18,66. Usono: J. Gamble 12,00. Sumo ĉi-jara: 282,06.

Volontula Fondaĵo: Aŭstrio: S. Stamm 13,08. Japanio: E. Isii 18,65. Sumo ĉi-jara: 291,39.

Ĝenerala Kaso: Anonime: 1,13. Francio: D. Laurent 1,73. Germanio: G. Grupp 6,45; G. Macioszek 7,53. Nederlando: F. D. van Zoest 11,35. Usono: J. Amis 5,06; S.-A. Estling 13,16; A. Gomez 50,61; D. C. Halley 101,22; T. J. Hashimoto 5,57; K. Pai 20,24; E. Sorenson 20,24; A. M. Steffes 15,18; J. T. Williams 2,02. Sumo ĉi-jara: 874,83.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA



DE MAURO: Ministro E-amika

En la nova itala registaro de Giuliano Amato, la 26-an de aprilo, enoficiĝis kiel ministro pri edukado Tullio De Mauro (67-jara), fama lingvisto bone konata al e-istoj. En 1995 De Mauro skribis, antaŭparole al la klasika lernolibro *Manuale di Esperanto* de Bruno Migliorini: "Komuna lingvo sen ajna etna bazo povas



esti (kaj inter la esperantistoj jam estas) translingva faciligilo por la ĉiam pli necesaj rilatoj interkulturaj. Ĝi... povus grave roli kiel jura referencilo primara, nacie neŭtrala... Eŭropa Unio povus decidi ke ĝi havu unusolan tekston referencan, kaj estus senchave ke, por ne atenci la egalrajtecon de nacioj, tiun oni vortumu en Esperanto."

Ankaŭ la nova ministro pri agrikulturo, Alfonso Pecoraro Scanio, iam esprimis sin pozitive pri Esperanto, en letera respondo al Lilia Fabretto. (M. Lipari)

GIBCYŃSKA: Aktora jubileo

Dum la 30-a Tutpollanda E-Kongreso (28 apr.-3 majo, Krakovo) speciala vespero omaĝis al la aktorino Jadwiga Gibczyńska, Honora Membro de UEA, kiu festis "pli ol 30-jaran agadon" kiel E-aktorino. (S. Mandrak)

STEELE: Honkongo de lingvoj?

Trevor Steele, kiu festis sian 60-jariĝon (14 majo) per apero de lia romano *Neniu ajn papilio* (baldaŭ ĉe la Libroservo de UEA), estas TEJO-aĝe moviĝema homo. La tutan pasintan jaron li restadis en Litovio, estrante en Vilnius kaj Kaunas senpage partoprenablajn E-kursojn de Litova E-Asocio: ĉiun el ili finis po ĉ. 100 personoj. Gvidinte en decembro seminarion por E-instruistoj, en februaro Steele forflugis al Honkongo. Tie li lingve perfektigas lokajn E-agantojn, prepare al la 56-a Internacia Junulara Kongreso (5-12 aŭg.).

Umberto Eco diris iam: "Esperanto povas fariĝi la Honkongo de lingvoj." Ĉu nun ankaŭ Esperanto povas fariĝi lingvo de Honkongo? Al Steele la defio.

→ materialoj ricevita el Litovio kaj Japanio. En solena vespero estis prezentita makedona poezio en E-o. "Estonto" jam eldonis du kompakt-diskojn, kun E-tekstoj pri Makedonio, Prilep kaj ilia E-movado, resp. kun makedonaj poemoj en plenumo de Gordana Jankuloska, la prezidantino de la societo.



Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondeblas la redakcio. Ni donas nenian rabaton ĉe ripeto de anonceto. La tarifon de anoncoj vidu en la kolofono, sub la enhavtabelo.



ANONCETOJ

MI FARAS DENTOPROTEZON

por esperantistoj kontraŭ teknika (simbola) prezo. Priparolu perletere. Telefonnumeroj en Jarlibro. D-ro Balázs Szemők, Ceglédbercel, Hungario.

ESPERANTO-DOMO en Sanica

(Bosnio k. Hercegovino, BA-79285) gastigis e-istojn el 13 landoj dum 22-jara ekzisto (1973-95). Nun ĝi estas detruita. Drago Smolić (Riemekestr. 3, DE-33102 Paderborn; ☎+49/5251/23-527, ♀26-981) serĉas e-istojn kaj homojn kun bona volo por rekonstruo.

PRO SANPROBLEMOJ

Aldo de' Giorgi estos ekde nun kontaktebla je la adreso de la filino: via Luigi Pera 10, IT-56124 Pisa, Italio; ☐chrisss@sirius.pisa.it.

DEZIRAS KORESPONDI f-ino

Aija Lapiņa (25 j., bibliotekisto): Liepu ielā 4, LV-4101 Cēsts, Latvio.

VIRINOJN VIKTIMOJN

de perforto prizorgas socia organizaĵo sub gvido de e-istino. Kontaktingu ilin kun simila unuiĝo en via urbo/lando por interŝanĝo de spertoj kaj amikiĝo. Skribu al Tanja Ruseva (Unuiĝo "Marija", str. Rahovec 5/II, BG-5100 Gorna Orjahovica, Bulgario.

VOLONTE KORESPONDOS

Juris Krūmiņš (instruisto, 54 j.), Ozolu ielā 6, dz. 3, LV-1016 Rīga, Latvio.

GESKOLTA GRUPO,

ĵus eklerinta E-on, serĉas korespondantojn tutmonde. Adreso: Grupo Escoteiro 19, DF Colegio Militar SGAN 902/904, BR-70790-025 Brasília (DF), Brazilo.

KORESPONDI ŜATUS

Li Yamin, viro. Adreso: Li Xin, English group, No. 21 Middle School, Qiqihaer, 161006, Ĉinio; ☐Li-yamin@263.net.

UZBEKIO: AERumu aŭguste

Sub la aŭspicioj de UEA okazos en Samarkando (15-20 aŭg.) Azia E-Renkontiĝo "AERO-2000" kun riĉa kultura, arta kaj ekskursiva programo, por akceli la E-movadon en la regiono. Bonvenas gastoj el ĉiuj kontinentoj. Ĉioninkluziva partoprenkotizo: 195 USD. Adreso: Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, P.O. B. 76, UZ-703000, Samarkand, Uzbekio; ☎+998/662/331-753; ♀ ("por ilhom H. Sadullaev") 310-777; ☐peacetur@samuni.silk.org (ne por longaj mesaĝoj!). La muzeo atendas ankaŭ **ridetojn** en ajna

formo (fota, grafika ktp.) por sia internacia kolekto "La mondo de ridetoj".

VJETNAMIO: Konkurso 2010

Hanoja E-Asocio (HEA) anoncas E-lingvan konkurson, "Hanojo — Via Rendevuo", por eksterlandanoj. Ĝi daŭros 10 jarojn, ĝis la mil-jariĝo de Hanojo en 2010. Ĉiujare en oktobro la Konkursa Organiza Komitato (KOK) kontrolas la sciojn de la kandidatoj kaj solene transdonos premiojn en Hanojo. Por plia informo, KOK havas projekton pri libro, kompakta disko kaj TTT-paĝo. (Dao Quang Thép, prez. de HEA)

Ingemund BENGTSOON (1919-2000), svedo, Membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, mortis la 12-an de aprilo.

Li estis membro de la sveda parlamento dum multaj jaroj kaj servis kiel ministro de agrikulturo kaj labormerkato. Li finis sian parlamentan karieron kiel ties prezidanto (1979-88).

En 1972 li gvidis la signifoplenan internacian konferencon pri medio en Stokholmo, el kiu sekvis la startigo de Media Programo de UN. Ĝuste Bengtsson fariĝis la unua prezidanto de ĝia gvid-konsilio.

Ingemund Bengtsson ofte surprizis la svedan ĵurnalistaron per montroj de sia lingva lerteco, kaj tial oni ofte menciis liajn lingvajn kapablojn.

En 1979 la sveda LKK por la UK 1980 en Stokholmo bezonis Altan Protektanton. Ni sciis ke Bengtsson studis Esperanton en studrondo kiam li estis 18-jara. Montriĝis ke li pli ol volonte akceptas tian honoron: li eĉ denove ekstudis Esperanton. Du tagojn antaŭ la UK li partoprenis en gazetara konferenco, al kiu venis pli ol 40 ĵurnalistoj. Antaŭ la inaŭguro li ĉeestis la akcepton por diplomatoj, kaj komence de la inaŭguro li bonvenigis la kongresanojn al Svedio per Esperantlingva prelego.

Unu jaron poste li aranĝis studviziton en la parlamentejo por la esperantistoj de la Stokholma regiono. En 1984 li invitis la estraron de Sveda E-Federacio al Bonniers Villa, kiun la



Ingemund Bengtsson (dekstre) bilardas kun la aŭtoro en registara vilao.

registro uzas por eminentaj gastoj. Jen tuta vespero kun supeo kaj interesaj diskutoj en vere familia etoso kun “nia” Ingemund.

En gazetoj kaj televidaj programoj, ĉe prezento de Ingemund Bengtsson, oni preskaŭ ĉiam starigis demandojn pri lia intereso pri Esperanto. Ĵurnalo iam demandis, dum liaj someraj ferioj, kion li estas faranta. Li respondis: “Mi legas libron en Esperanto: *Winnie-la-Pu*.”

En sia pozicio li ofte partoprenis en bankedoj kun la Reĝo kaj la Reĝino, kaj iun fojon li sidis sufiĉe longe kun la Reĝino por bone instrui al ŝi la gramatikon de Esperanto. Li estis entuziasma por Esperanto kaj diris al ni en

la sveda estraro ke ni ĉiam rajtas utiligi lian nomon en reklamo por la lingvo.

Jubilea jaro 1987, jubilea sveda kongreso. Kie? En la sveda parlamentejo! Bengtsson havis decidrajton pri ĝia ludono al aliaj aranĝoj ol pure parlamentaj, kaj li mem proponis ĝin al SEF kiel okazejon. Bedaŭrinde, Bengtsson malsaniĝis semajnon antaŭ tiu kongreso, sed rezerve troviĝis alia parlamentano por inaŭgura prelego en Esperanto, Daniel Tarschys – nun iom pli konata pro sia kvinjara deĵoro kiel Ĝenerala Sekretario de Konsilio de Eŭropo.

Ĉu ni iam ricevos similan mecenaton por Esperanto en Svedio denove?

Roland Lindblom

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (eksteraj rilatoj, kunordigo): S-ro Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain, Sydney 2041 NSW, Aŭstralio; ☎ +61-2-9810-4227; ✉ +61-2-9555-9705; ☐ kependerby@bigpond.com.

Vicprezidanto (Kampanjo 2000, financo): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto, IT-00036 Palestrina,

Italio; ☎ +39-06-957-57-13; ✉ +39-06-957-66-33; ☐ corsetti@itelcad.it.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-06-39-72-61-98; ✉ +39-06-39-72-61-69; ☐ lipari@esperanto.nu.

Estrarano (faka kaj scienca agado, edukado): d-ro Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice, Ĉeĥio; ☎ +420-2-991-2201; ✉ +420-2-991-2126; ☐ chrdle@telecom.cz.

Estrarano (Afrika agado, sporto): s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎ +228-27-21-17; ☐ esp.togo@cafe.tg.

Estrarano (kulturo, landa agado): s-ro Tacuo Hugi-moto, Kubota 31, Sakio-ku, Kyōto, 606-8266, Japanio; ☎/✉ +81-75-711-45-58; ☐ jasu-k@mac.email.ne.jp.

Estrarano (informado): s-ro Kalle Kniivilä, Skyttelinjen 55, SE-226 49 Lund, Svedio; ☎ +46-70-636-93-78; ☐ kalle@esperanto.se.


NOVAĴOJ

de la eldona fakto
de UEA

ENKONDUKO AL DEMOKRATIO

KIO ESTAS DEMOKRATIO? 80 demandoj kaj respondoj.
David Beetham kaj Kevin Boyle. Ilus. Plantu. El la
angla trad. Geoffrey Sutton. Rotterdam: UEA 2000.
143p. ISBN 92 9017 066 2. 21cm. Prezo: EUR 9,90.

Du elstaraj britaj fakuloj klarigas en ĉi tiu gvidilo de Unesko okdek el la plej premaj demandoj pri la esenco, celoj kaj funkciado de demokratio. La demandoj estas aranĝitaj en ses sekcioj: bazaj konceptoj kaj principoj; liberaj kaj justaj elektoj; malferma kaj respondeca regado; rajtoj de unuopuloj kaj ilia defendado; demokratia socio; la estonteco de demokratio. Bonega kaj klara enkonduko en la plej gravan politikan koncepton, uzebla kiel lernolibro aŭ baza konsultlibro. Bela grafika vesto kun spritaj ilustraĵoj de Plantu, ĉefdesegnisto de la franca ĵurnalo *Le Monde*.



RESPONDOJ PRI RASISMO



PAĈJO, KIO ESTAS RASISMO?
Tahar Ben Jelloun (1944). El la
franca trad. Armela LeQuint kaj
Jak Le Puil. Rotterdam: UEA,
1999. 52p. ISBN 92 9017 063 8.
19cm. Prezo: € 6,50.

"Bela libreto pri komplika temo. Dekjarulo povas kompreni la enhavon kaj plenkreskulo legas ĝin kun intereso. La originalo de la maroka Goncourt-laŭreato fariĝis furoraĵo en Francio. Aĉetu kaj legu ĝin. Diskutu ĝin en via Esperanto-klubo, kun viaj infanoj kaj kun viaj amikoj." (Leif Nordenstorm)

POR FACILE TROVI ALIAN VORTON

ESPERANTAJ SINONIMOJ.
Jaan Ojalo (1914). Rotterdam:
UEA, 1999 (3-a korektita eld.).
96p. ISBN 92 9017 067 0.
19cm. Prezo: € 7,20.

Ofte oni sentas la bezonon vigligi kaj variigi sian stilon per uzo de sinonimoj aŭ de preskaŭ-sinonimoj. Por helpi en tio, la estona aŭtoro kompilis tiun ĉi vortaron. Bazita sur Plena Ilustrita Vortaro, ĝi enhavas 1925 kapvortojn kaj 5500-vortan indekson. Taŭga fonto por ĉiu kiu volas pliriĉigi sian vortostokon.



KAJ PLIE...

LA LABORO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO POR PLI PACA MONDO. Ulrich Lins. 12p. Prezo: € 2,10.

THE WORK OF THE UNIVERSAL ESPERANTO ASSOCIATION FOR A MORE PEACEFUL WORLD. U. Lins. 12p. Prezo: € 2,10.

TRIONA RABATO EKDE 3 EKZ. DE SAMA TITOLO ĈE LA LIBROSERVO DE UEA.

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Telefono: +31 10 436 1044 Telefakso: +31 10 436 1751 Retpoŝto: <uea@inter.nl.net>

Rikolto de 50 jaroj

“La jaro 1997 signas la 50-jariĝon de mia serioza verkado en Esperanto. La ĉefa rikolto de tiu verkado estas la kvindeko de miaj libroj (ankoraŭ plimultiĝonta) sur breto en mia biblioteko. Sed post ĉiu rikoltado postrestas surkampe pajleroj kaj stoploj, kiujn oni kutime forbalaas aŭ surtetas. — Mi do decidis kolekti libroforme tekstojn miajn, kiuj ŝajne havas valoron pli ol nur efemeran, kaj jen la rezulto. Ekzemple, dum mia vivo mi verkis verŝajne centojn da librorcenczoj; la plimultaj estas sufiĉe rutinaj, sed de tempo al tempo mi pliprofundigis en la koncerna afero, kaj la rezultinta rcenczo eble kontribuas al nia literatursplora laboro. Tiajn do mi decidis ‘savi’.” (William Auld)



La libro estas aranĝita en kvar sekcioj: Eseoj, Rakontoj, Tradukoj, Libro-kulturo. Tre bela grafika prezento.

PAJLEROJ KAJ STOPLOJ. Elektitaj prozaĵoj. William Auld. Rotterdam: UEA, 1997. 348p. ISBN 92 9017 052 2. 21cm. Prezo: € 19,05.

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

Kvindek jarojn post la fondiĝo de la Kastelo ni apelacias por subteno al la **JUBILEO LIBRO DE GRÉJILLON** aperonta en la jaro 2002.

Malfermiĝis fonduso ĉe UEA “juĝr-g” por akcepti viajn kontribuojn, sendeblaj ankaŭ al la speciala poŝteko-konto de la kompilanto «Mme LLOANCY Marie-Thérèse — Memorlibro» 5 908 07 A Bordeaux. Kiu donacos minimume 50 ricevos senpagan ekzempleron de la bonkvalita, plurloke kolore ilustrita libro.

Kongreso sur via koverto

Ideala ornamaĵo por viaj leteroj en la monatoj antaŭ Tel-Avivo, la kongresa glumarko estas mendebla ĉe la Libroservo de UEA: po € 1,35 por 1 folio de 15. Triona rabato ekde 3 folioj.



SALUTU DRAKE!



AMUZAJ GLUMARKOJ DE LA 56^a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN HONKONGO.



14 plenkoloraj glumarkoj de 7 diversaj tipoj sur unu folio.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA: po € 1,00 por unu folio. Triona rabato ekde tri folioj.



HRVATSKA AKADEMIJA ZNANOSTI I UMJETNOSTI

kaj

AKADEMIO DE ESPERANTO

Internacia simpozio pri lingva planado kaj leksikologio

Sub la aŭspicioj kaj kun la subteno de la Kroata Akademio de Sciencoj kaj Artoj, la Akademio de Esperanto organizas internacian simpozion pri lingva planado kaj leksikologio, en Zagrebo, Kroatujo, de la 28-a ĝis la 30-a de julio 2001. La laborlingvoj estos la kroata, Esperanto, la angla kaj la franca.

• Simpozio

La Iliria Halo de la Kroata Akademio de Sciencoj kaj Artoj, Opatička 18, HR-10000 Zagreb, Kroatujo.

• Kontribuoj

Ni bonvenigas sciencajn kontribuojn al la simpozio. Sendu vian tekston en elektronika formo al profesoro Geraldo Mattos, mattos@super.com.br, antaŭ la fino de novembro 2000.

• Partoprenado

Personoj kiuj deziras partopreni en la simpozio (eĉ sen prezento de iu verko) estas petataj informi profesoron Christer Kiselman, kiselman@math.uu.se, antaŭ la fino de majo 2001. (Papera adreso: Poŝtkesto 480, SE-75106 Uppsala, Svedujo.)

LEGOLIBRO EL KANADO

LITO APUD LA FENESTRO.
Betty Salt (1907-1994).
Rotterdam: UEA, 1999. 111p.
Prezo: € 4,80.

Simplaj rakontoj, teatraĵetoj kaj poemoj, kun kelkaj tradukoj el la kanada literaturo. Stile belaj, ili facile kaptas ankaŭ la malpli spertan leganton, dank' al relative facila lingvaĵo. Ankaŭ pro la mallongeco de la plej multaj tekstoj la libro bone taŭgas kiel progresiga legaĵo.

